


# CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO  
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 107**

***N-RO 10 (78), SEPTEMBRO 2019***

# Enhavo

## *Originala poezio*

**Nikolao Neĉaev. Degelo; Printempo pentras; Jeto** 3

**Aleksandro Mitin. Abeloj** 5

## *Originala prozo*

**Stepano N. Rakonto de ĉeestinto** 9

## *Tradukita poezio*

**Irina Ratuŝinskaja. 4 poemoj. Trad. T. Auderskaja** 13

## *Tradukita prozo*


**Leonis Kaganov. Kie ne estas vento. Trad. M. Povorin** 16

## *Kultura projekto*

**Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento**

**Amatin', ne ĉagrenu cin. Trad. V. Minin** 39

## Originala poezio



*Nikolao Neçaev*

### Degelo

Akveroj akvarele  
Irizis la humoron.  
Mi vivas malkverele,  
Mi havas pacan koron.

Penetris koren guto  
Ĉar mia koro likas.  
Finiĝis mia muto,  
La koro eklirikas.

*En konkurso EKRA Razgrad, Bulgario) 2019 la poemo gajnis duan premion*

### Printempo pentras

Tempo temperas  
Sunon en alto.  
Kore aperas  
Hela ekzalto.

Temperaturo  
Tentas la koron.  
Versa pikturo  
Pentras koloron,

Ĝojan koloron  
De primavero.  
Vekas majhoron  
veko de tero.

### Jeto



Alte, sur lazura tolo  
Pentras blankan strekon jeto.  
Mi eskapos el parolo,  
Mi ne estos plu poeto.

Pentros mondon tiun belan  
Mi passtele kaj tempere,  
Pentros shipon, blankon velan  
Kiu vivas nur libere.

Ekster vortoj mi liberos,  
Mi liberos ĉe koloroj.  
Sur la tolo tuj aperos  
Laro, maro, arboj, floroj...

Tiel revas mia koro  
Kiam vidas mi en alto,  
En lazuro, alt-koloro  
Blankan strekon de jet-arto.



## Abeloj

*Aleksandro Mitin*

1.  
Svarmas abeloj,  
Flugas abeloj  
Tien kaj reen  
Sub la ĉielo,  
Tagon post tago  
Nek vago, nek blago,  
Tagon post tago —  
Ago kaj ago.  
Jen, kvazaŭ sago,  
Hastas trans lagon  
Grupo pasia  
Al kampo miela,  
Pura kaj bela.  
Prenas nektaron,  
Por nutri alian  
Laboristaron.



— Hast' sen prokrast',  
Viv' ne fabela...  
Diru abelo,  
Vi penas por kio?

— Por ke la sekva  
Generacio  
Eklaboregu,  
Por nova aro  
Portu nektaron,  
Faru mielon,  
Larvojn en ĉeloj  
Nutru kaj flegu...

Sen la ferio,  
Sen iu hobia,  
Distro aŭ ludo...  
Kaj tiel plu.  
Do...

2.  
Flugas abeloj  
Preter la homoj —  
Kiuj kreskigas  
Kampojn mielajn,  
Kampojn aromajn,  
Purajn kaj belajn.



Homoj ne ĝemas —  
Semas kaj semas,  
Kreskigas legomojn,  
Semas verdaĵojn,  
Semas konstante,  
Paŝon post paŝo,  
Neniun kaveton  
Preterlasante.

— Diru, ne ĝenu,  
Kial vi penu  
Kun tro da pasio?  
Semu por kio?  
— Por ke jarcentojn  
Travivu la rondo,  
Por kresku verdaĵoj  
Sur tuta la mondo.  
— Kion ricevas  
Vi de naturo?  
Ĉu pli da semoj?  
— Tro da problemoj.  
Sekas la grundo,  
Sekas kaj krevas.  
Ni eĉ ekrevas  
Pri la inundo.

Kampoj malplenaj  
Estas tre foraj,  
Ilin posedas  
Aborigenoj  
Al ni malfavoraj.  
Ni ilin tedas,  
Ili oscedas  
Kun abomenoj.

Kaj en proksimo  
Staras arbaroj  
Baroj centjaraj,  
Natura limo,  
Kiun ne eblas  
Iel ataki,  
Iel trahaki,  
Ĉar propraj fortoj  
Mankas. Ni feblas  
Kontraŭ ĉi hordoj!  
Tia domaĝo —  
En la vilaĝoj  
Homoj malmultas,  
Pli kaj pli aĝaj...  
Eĉ ne sufiĉas  
Por nuna kamparo...  
Tial rezultas  
Jaro malriĉa,  
Tre malfeliĉa,  
Tiom amara!

Do jen nia sorto —  
Streĉi la fortojn,  
Trove stimulojn  
Labi, ne ĝemi;  
Voki oldulojn,  
Devigi infanojn,  
Por daŭre semi  
Laŭ niaj planoj...  
Por nepoj nin benu,  
Najbaroj komprenu,  
Ĉiu terano  
De ni ion prenu  
Kaj eble asistu  
Post kiam ricevos...  
Sed ni ne plu revos  
Pri l' mondharmonio.  
Nur ke ekzistu  
Almenaŭ ĉi tio.

Ni daŭre servu  
Niajn konvinkojn,  
Sed por konservi  
Ĉiujn atingojn,  
Fortojn malŝparu!  
Laboro ne ĉesas.  
Ja kuri necesas,  
Por daŭre ni staru!



3.  
— Abeloj, rigardu!  
Mi petas momenton.  
Jen! Nova ideo!  
Nova invento,  
Frukto de kreo.  
— Ho, Leonardo,  
Trankvilu, ne ardu.  
Vi estas saĝa  
Abelo, kuraĝa  
Fan-ta-zi-ulo!  
Jam multeaĝa.  
Utila ĉe nulo...



Agoj rutinaj  
Vin lasas enua.  
Sciu, vi tute  
Ne estas unua,  
Ne vi estos lasta  
Strangulo bombasta.  
Kio, se tamen  
Apud la fino  
Vi malsukcesos  
En pen' de progreso?  
Haltu provokon.  
Vi nin ne impresos!

Hasti necesas  
Por stari sur loko.

Nenion vi ŝanĝos.  
Kaj via vivo  
Sen kolektivo.  
Pasos sen ŝpuro.  
Ne pensu, sed kuru!  
Kial vi manĝas?  
Ĉu ni vin nutru?  
Karas mielo!  
Vira abelo  
Delonge jam putru  
Ene de sablo.  
Via kapablo  
Por la Reĝino  
Venis al fino!

Por ke vi manĝu,  
Vin mem tuj ŝanĝu.

Via ideo  
Estas ja blago.  
Prefere vi agu!  
Se vi eĉ feblas  
Ŝanĝi vin mem,  
Kaj diras “ne eblas”,  
Via kreem’  
Estas petolo.

Tiu parolo,  
Ve, multe pravas —  
Novaj ideoj  
Rare sukcesas...  
Se ili havus  
Mil Leonardojn,  
Junajn kaj ardajn,  
Iu el ili  
Per siaj kreoj  
Nepre progresus,  
Povus utili,  
Deŝirus de nulo.  
Sed kelkaj soluloj  
Ŝtonon ne rongâs,  
Nur eferveskas,

Do iuj kreskas,  
Iuj ja — plonĝas...

4.  
Svarmas abeloj,  
Svarmas formikoj,  
Svarmas stranguloj  
Kun siaj verdaĵoj,  
Plendas, kritikas  
Vivon komplikan  
En ĉiuj anguloj,  
En mornaj fabeloj,  
Lulante gefilojn  
Plurajn jarmilojn.  
Nur Leonardo  
Vivas kun ardo,  
Sed malutilas,  
Dum sola li brilas.

Ho, se ni havus  
Mil Leonardojn...





## *Originala prozo*

### **Rakonto de ĉeestinto**

*Stepano N.*

\*\*\*

Mi skribas ĉi-liniojn en malgranda kafejo survoje al Enotia. Estas trankvile, preskaŭ forestas vojaĝantoj, kaj neblas kredi, ke nur kelkajn urlojn de ĉi tie furiozas milito, faladas obusoj, kaj pecoj de homa karno disflugas en la ŝtonaj kortoj. Mi loĝis tie dum tri jaroj, travivis malsaton, malvarmon, ruinon, mortojn kaj perfidojn de amikoj – ĉion, kion altrude kaj senelekte proponas al ni milito. Rifuzi ne eblas. Nur hodiaŭ oni min elveturigis kun la lasta konvojo, el tiu loko, kiu iam estis mia Patrujo. Nun tie restis mortaj urboj kaj putrantaj vilaĝoj. Sed iam...

\*\*\*

Tri jarojn antaŭe oni deklaris, ke ni estas malamikoj de demokratio kaj komencis poiomete eduki nin en la ĝusta senco. Unue aperis pluraj por-Gargejaj organizoj, uzantaj ties fondusojn kaj promociantaj ties valorojn. Verdire, ili aperis jam delonge, sed tiam ilia agado ne estis tiom rimarkebla: ili simple liveris monon al siaj aktivuloj, helpante al ili memstariĝi, ekhavi fortajn sociajn rilatojn kaj do influon. Miaj konatuloj sin nutris de tiuj subvencioj, kaj al la demando, kio okazos al tiuj senhejmaj kompatindaj infanoj, kiam finiĝos la trijara subvencio por ilia subteno, la eminenta pedagogo Arika gaje kaj senzorge ekridis: “Nu, mi skribos novan subvencipeton! Ja temoj multas!”. Al miaj provoj klarigi, ke temas ne pri ŝia nutrado, sed pri la nutrado de infanoj, ŝi reagis tre akre, kaj nia komunikado porlonge ĉesis. Ŝi trapasis multajn trejnajn seminariojn kaj bone scias forhaki nebezonatajn demandojn kaj nebezonatajn homojn.

Nu do, kiam tiuj organizoj sufiĉe maturiĝis, ili komencis montri sin publike. Propagandi siajn ideojn, alvoki al ilia realigo. Kiel idealo, certe, rolis Gargio. Kaj ĉar la vivo ĉe ni tiam estis sufiĉe aĉa, t.e. regis la severa leĝo: “ŝtelu aŭ mortu!”, - do, multaj, kiuj sincere deziris ŝteli, sed elpost la larĝaj dorsoj de la venintaj pli frue ne povis kapti eĉ peceton, ekiris tien, kie oni disdonadis la monon libere. Fakte, oni devas fari preskaŭ nenion: kolekti ian etan informon; okazigi tute sendanĝerajn, eĉ soci-utilajn agojn, ekz., la diritan helpon al senhejmaj infanoj; partopreni ian “rondan tablon”; krei kaj pleningadi ttt-ejon, subteni fremdajn similajn ttt-ejojn... Ja negranda laboro: skribi kelkdek mesaĝojn tage, kurtajn, kvazaŭ preterajn – sed mono ja gutas! Tiun vojon sekvante, oni povas poiomete fariĝi biznesulo, se la kapitalo akumuliĝis, - sed prefere resti volontulo, ne riskante sian havaĵon aŭ monrimedojn. Tia modesta, nerimarkinda aktivulo reale estas la parto de granda forto, ĉelo de tutmonda reto.

Kaj kiam estis atingita la krita maso kaj la reto kovris la tutan landon, tiam komenciĝis elpaŝoj sur placoj. Komenciĝis popolaj agoj, al kiuj denove hastis la samaj homoj, kiuj ne sukcesis ŝteli aŭ sukcesis ne tiom, kiom volis, ĉar la plimulton de la predo forprenis de ili tiuj, kiuj venis al la nutrotrogo pli frue. Kaj de la alia flanko – vilaĝanoj, kiuj ne ŝtelis nur pro la manko de kapabloj kaj foresto de tio, kion eblus ŝteli. Nu, kompreneble, ankaŭ la juna generacio, nia apogo kaj futuro, ĉiam preta saltadi kaj kriadi kontraŭ “dikaj patroj” kun espero iam okupi iliajn lokojn.

Jen pri infanoj estas interesa afero. Ĉi tie klare videblas, ke nia milito tute ne estis subita. Jam 20 jarojn niajn infanojn edukadis malamikoj, preparigante ilin por milito kontraŭ ni. Mi memoras, ke kiam ĉe ni okazis la lasta malsato, la registaro ne altigis la salajrojn al instruistoj – ĝi male, tute ĉesis financi la edukadon kaj sciencon. Instruistoj, por elvivi, venis al stratoj por vendaĉi ion ajn, en lernejoj oni tute ne zorgis pri infanoj, nek klerige, nek eduke: tiam oni konsideris NORMALA afero, ke knaboj deziras esti banditoj, kaj knabinoj – putinoj, ĉar nur tiuj du kategorioj tiam havis monon kaj vivis bonhave. Tamen, per la ŝparita je instruistaj salajroj mono oni reverkis la lernolibrojn, por modli el niaj infanoj malgrandajn gargianojn, kvankam ili loĝis tute ne en Gargio. Kion do tiuj povis fari? Certe ribeli, impeti ien, dezirante fari el sia lando la adoratan Gargion. Kaj en lernejoj ilin jam atendis Babosaj geinstruistoj, ricevantaj subvenciojn el Gargio...

Kaj jen, antaŭ 3 jaroj io tio fin-fine eksplodis. Komence tumultoj sur la placo en ĉefurbo; poste – en grandaj urboj... kaj malgrandajn urbojn neniu eĉ demandis, ĉu ili deziras ribeli: eku kaj obeu! Tie, tute subite, jam armitaj, kiel Atena el la kapo de Zeŭso, aperis taĉmentoj de partuj-defendantoj, senprokraste alproprigintaj kaj la potencon, kaj la havaĵon de malpli lerta ularo.

Parto de la lando provis kontraŭstari – sed nur tiu parto, kiu havis landlimon kun Kumbio, ankaŭ granda lando, kaj konstanta oponento de Gargio. Ĉio, kio troviĝis pli foren de la limo, restis en severa ĉirkaŭpremo kaj iĝis pli kaj pli senkompatate deprimita. Edifa leciono por ribelintoj fariĝis “ekzekuto per glavo kaj fajro” en Ivaro, senzorga ĉemara urbo, fama pro kuraĉlokoj kaj komerca haveno. Tie oni bruligis vivajn ĉirkaŭ centon da civitanoj, kunvenintaj en unu el klubejoj por “Konferenco por formado de kompreno pri la aktuala situacio”. Nenio tiel kontraŭas al la gargia vivsistemo, kiel emo de simplaj homoj KOMPRENI. Tiun infekton endas forbruligi per ardanta fero, por ke ĝi ne stumbligu la gvidantojn. Kaj oni forbruligis. En la rekta senco de la vorto... Tiujn, kiuj provis saviĝi el la flamanta konstruaĵo, malsupre oni mortbatis per bastonoj kaj per kruroj. Tre prudente kaj racie planita operacio de timigo.

Post tio la tuta lando eksilentis kaj sin kaŝis ferminte la okulojn. Komenciĝis la sekva etapo: senbrua sufokigo de silentuloj. Ĉiunokte oni forprenadis realajn kaj imagitajn “malamikojn de l’ popolo”. La restintaj devis

mimetismi por elvivi. Ili unuaj elpendadis frambo-violkoloran standardon de la reganta reĝimo, kriis ĉe renkonto “Gugu ban!” (oficiala saluto, anstataŭ la kutima “Saluton!” aŭ “Bonan tagon!”). Al tio endis respondi: “Ban bariba!”, kaj nerespondintajn oni tuj batadis feroce. Sed ne multaj arogis ne respondi; kaj la semo de kovardeco kaj perfidemo protima pli kaj pli kreskis en animoj de “simplaj homoj, ne dezirantaj batali”.

Sed la milito proksimiĝis. Por ĝi oni mobilizis pli kaj pli multajn ŝtatanojn, kaptante ilin eĉ surstrate kaj en publikaj trafikiloj. Kaj post unuaj mortoj kreskis krueleco, kaj la milito por la potenco de Gargio poiomete transformiĝis en la militon de ĉiuj kontraŭ ĉiuj sur la teritorio de nia povra Burbugo. Ĉiu regiono armiĝis per sia propra armeeto kaj pretis sin defendi de ĉiuj alii. Spionoj, partizana milito – nenio evitis nin!

Precipe terura estis la unua jaro, kiam la popolo ankoraŭ ne ekkonsciis plene, ke la milito jam ekis, kaj ne sukcesis prepariĝi por la vintro. Daŭre ŝajnis, ke ĉio tio estas absurdo, sensencaĵo, malbona sonĝo, de kiu ni povus vekigi, ke la aferoj iel mem stabiligis, ĉio pasos... Tre multaj homoj mortis tiuvintre – sen elektro, sen varmo kaj akvo. Sed, kiel strange, la ĉefa priparolata kaj priplorata kialo de senespero estis foresto de Interreto, televido kaj elektro por ŝargi la mobilajn telefonojn. Homojn obsedis vera abstina krizo pro senigo de objektoj de artefarite kreita bezono. Tre multaj freneziĝis, ne elteninte profundan vakuon en sia cerbo. Ja ili delonge dekutimiĝis legi, pensi, interpretadi la okazaĵojn. La tutan informon, ĉiujn pensojn ili ricevadis pretajn el ekranoj de komputiloj kaj televidiloj; kaj kiam tiu kanalo estis barita, tiam ululanta, silbanta vakuo ekregis ilian cerbon, kaj la cerbo ne plu povis regi la sensencan korpon...

Homoj komencis manĝi unu la alian en la rekta kaj nerekta senco. Okazis ondo de priraboj, kaj multaj de ili estis sufiĉe bizaraj. Vi scias, certe, ke en komputila epoko oni ĉesis legi librojn, kontentigante sin per bildetoj surekrane. Hejmaj bibliotekoj, kiujn oni kolektis dum multaj jaroj, kaj ofte eĉ dum la vivoj de kelkaj generacioj, estis ĝoje forĵetataj al rubujo per feliĉaj heredantoj de olda furzulo, kiu fin-fine mortis, liberiginte por ili la loĝareon.

En la novaj loĝejoj ne estis loko por libroj; tie estis loko por... Por kio? Neniu scias. Verŝajne, por tiu sama vakuo, kiu regis en la cerboj kaj animoj de iliaj posedantoj.

Do jen: librojn oni forĵetadis. Tradukistoj kun ardo sin liberigis de centkilogramaj vortaroj, por sin inici al la plej novaj atingoj de la civilizacio en formo de diversaj KAToj – aŭtomataj sistemoj de traduko. Tiuj sistemoj neimageble plifaciligis la vivon de tradukisto, plialtigis la rendimenton... Kaj kiam ĉio tia falis en abismon, evidentiĝis, ke multaj mojosaj tradukistoj ne konas la lingvon, ne scipovas uzi la paperan vortaron, kaj eĉ simple dekutimiĝis skribi permene! Kaj, dum ilia laboro ankoraŭ estis bezonata, okazadis priraboj, kiam la

celo de rabistoj estis ... vortaroj! Pli bonhavaj kolegoj dungis rabistojn, por ke tiuj alportu al ili eblecon daŭrigi mondonan laboron kaj sametempe forigu la konkurantojn. Mi scias tion, ĉar mi interkomunikis kun tia medio, kaj kelkajn miajn konatojn tiamaniere oni prirabis, iun eĉ mortigis, kaj multaj aliaj interflustris, ke tio okazis laŭ la mendo de aliaj miaj konatoj, kiuj jam en “papera” medio sukcesis daŭrigi sian negocon.

Kompreneble, eĉ pli malbone estis en inĝenieraj kaj sciencaj rondoj, kie necesas kalkuloj, desegnaĵoj, konatiĝo kun plej novaj atingoj en sia tereno. Malapero de Interreto fakte neniigis la tutan praktikan agadon en tiu sfero. La homo tiel ĝoje fordonis ĝin al maŝinoj – kaj subite okazis, ke maŝinoj povas panei, kaj la homo mem jam forkutimiĝis fari ĉion tion mem. Feliĉe, ke al neniu jam bezonatis scienco kaj tekniko...

En tiu unua malluma kaj malvarma vintro, laŭ la stratoj marŝadis armitaj patroloj kaj forpafadis sennombrajn frenezulojn, vagantajn sencele. Al siaj familioj ili ne estis bezonataj, ĉar en familioj ne estis kion manĝi eĉ por “aktivaj” membroj. Sed pragmata registaro trovis por tiuj sencerbuloj tre racian uzon... Multaj, multaj malfeliĉuloj estis savitaj en aliaj partoj de la mondo... Sed pri tiuj aferoj mi tute ne volas paroli.

Tiuj, kiuj travivis unuan vintron, ĝisvivis ĝis legomĝardenoj. Renaskiĝis metioj: tre bezonata okazis scipovo kudri vestaĵojn kaj ŝuajojn. Aperis malgrandaj hejmaj lernejoj, eĉ klasoj, kie infanojn oni instruis laŭ la konservitaj libroj. Kiel oni rememoris tiam stakojn da libroj en rubujoj! Sed per libroj en tiu vintro oni ankaŭ hejtis ĉambrojn... Kiel malvarme estis en malplenaj loĝejoj!

Kaj la mondo trankvile rigardis al mortanta Burbugo. Ĉiu havas siajn zorgojn. Fin-fine, ili havas tie bonegajn grundojn, rarajn minaĵojn – sed ia biomaso rampas sur ili kaj malhelpas uzi tiujn riĉaĵojn civilizite. Sed estas ja kiuj povus ilin uzi racie! Kaj jen, komencis faladi sur niajn kapojn oni-ne-scias-kies obusoj. Laŭ la lupa leĝo: la tuta luparo al senfortulo, por disŝiri kaj formanĝi lian korpon.

Adiaŭ, la lando Burbugo! Adiaŭ, la standardo frambo-violkolora! Disŝirita per eksplodoj, malpurigita per brulaĵo, vi flirtas super mortaj urboj kaj putrantaj vilaĝoj. Jam preskaŭ neniu tie restis, kaj baldaŭ novaj gemastroj venos sur la kripligitan teron. Ili ne rememoros, nek per bona, nek per malbona vorto, tiujn, kiuj loĝis sur tiu tero antaŭe. Ili, antaŭaj, elpensis por la duono de siaj civitanoj la nomon “biologia rubaĵo”. Jen ili mem fariĝis rubaĵo, kaj estas forbalaitaj de la vizaĝo de la tero kaj pravaj, kaj malpravaj.

Tiel finiĝis Burbugo, kiu ekdeziris esti La Granda Burbugo... sed ne ekpovis. La Grandaj ne naskiĝas el servado kaj fremdaj ordonoj.

Kaj mi iras al Enotio. Al oriento, kie la suno kaj la lumo.

*27 sept, 2014*

## Tradukita poezio



### ***Irina Ratušinskaja***

*Irina Ratušinskaja (1954-2017) naskiĝis en Odeso, tie finis fizikan fakultaton de la universitato. En 1970-aj ŝi komencis verki poemojn, kiuj ekdisvastiĝis samizdate. En 1979 transloĝiĝis al Kievo. La unua publikigo de ŝieaj poemoj okazis en 1982 eksterlande, en la revuo "Facetoj" (Grani), pro kio estis arestita kaj kondamnita por 7 jaroj de mallibero pro "kontraŭsovietia propagando", kvankam ŝiaj poemoj neniam temis pri kiu ajn politiko. En 1986 sub premo de internaciaj instancoj, i.a. PEN-klubo, estis liberigita, sed senigita de la sovetia civitaneco kaj formigris al Londono. En 1986-91 multe batalis por liberigo de politikaj malliberuloj en Sovetio. En politikaj partioj kaj grupoj ŝi neniam partoprenis, sed estis aktiva en la religia vivo de la ortodoksa eklizio. En 1994 ricevis rusian civitanecon. Ĝis 1998 loĝis en Londono, poste venis al Moskvo, kie loĝis ĝis la morto. Ŝi estas aŭtoro de kelkaj libroj – romanoj, rakontoj, rememoroj, poemoj, kaj de scenaroj de pluraj serioj en televidseriaroj "Reveno de Muĥtaro", "Mia belega vartistino", "Taksiistino" ka.*

\*\*\*

En kretena jaketo, iam infana palt'  
Kun la kapo, plena je bizara rimita frazar',  
En Odessa mi estis feliĉa sen fin', sen kompar',  
Sen ĉeval', sen regno kaj brido por halt'.

En Odessa mi estis – lokusto sur stepa flor'.  
Nek ĵuroj, nek larmoj, nek sal' por kunviva daŭr'.  
Vi forflugu, revenu – solviĝos ajna dolor'  
Pro meliloto polva, lazur' kaj mituloj ĉe lignofajr'.

Miaj stratoj estas frotitaj de mia paŝ',  
La ŝtuparoj platiĝis pro l' kur', forlekigitaj eĉ ĝis glaci',  
Miaj rokoj brilas per dorsoj el mara verdaĵ',  
Kaj foreksplodita de l' Placo Templ' la Templ' de mi.

Sed kiam mi laciĝos, sed resurektos la Templ',  
Mi prenos biletan reen, al hejma sin'.  
Al stratetoj, al varma vespero, memor' kaj hel',  
Kaj kandon vendos al mi mia ciganin'.

\*\*\*

Abrupte ŝanĝiĝis vento.  
La nova deziras venkon.  
Siegas nin la ĉielo,  
Konkeras suburbojn vent' .  
Ekhenis ĉevaloj tondre  
Post muro dikega norda,  
Sed rompis l' atak' unua  
Remparojn de l' orient' .

Kaj tuj en la breĉo fuma  
Pereis ruinaj turoj,  
Falegis preĝej' gardanta  
Kun krucoj kaj ikonar' .  
La urbo batalis arde,  
Ĝi estis terura kaj bela,  
Dum muĝe dronigis ĉielo  
Restaĵojn de l' lasta rempar' .

Sed poste, kiam la akvoj  
Kaj muroj desupre nin premis –  
Neniu celebris venkon  
Ilian kun glora kant' .  
Kaj ili de tiam strebas  
Imiti iun per modlo;  
Sed nur detalojn sensencajn  
Skizigas senpova man' ...

\*\*\*

Ĉio, kion mi petis,  
Estos por mi, ja estos  
(Dio mia, ho dankon!):  
Kaj malproksima vojo,  
Kaj novaj homoj.

Estos por mi, ja estos  
Kanto senhejma  
Kaj memoro fiera.  
Estos ĉielo  
Kun la honoro  
Kaj la mantelo  
Sub piedoj miaj.

Estos ja --  
-- Ho, kiam? --  
Fabelo feliĉa  
En ment' kaj absinto.  
Robo, masko punta  
Kaj la danco bunta.  
Kaj neniu diros:  
Sufiĉe vi jam vivis!

## La ondo

Li foriris al mi, forlasinte vin –  
Ĉu mi kulpas pri io ajn?  
Tiel gvidis lin spitema destin’.  
Li iĝis nun mia gajn’.

Do ne staru vi apud mara rand’,  
Ne atendu ĉe Blanka Rok’!  
Mi forviŝos la spuron el sabla strand’  
En eterna kaj gaja mok’.

Ĉar la vojo mia laŭ strikta ord’  
Indikita estas en mar’;  
Mi venados plu al vilaĝa bord’,  
Kiel faris mi dum miljar’.

Kaj la saman ordon obeas lun’  
Kaj fiŝoj, kaj vir’ el vilaĝ’...  
Li venadis al maro en vintr’ kaj aŭtun’,  
Konstante, kun la kuraĝ’.

Li foriris al mi, forlasinte vin,  
Ja vi scias, memstaras li.  
Kaj pro sia neŝancebla obstin’  
Min preferis al via lit’.

Mia lito el mara silka herbar’,  
Mi pretiĝis ĝin kun zorgem’...  
Li foriris de vi al la fora mar’,  
Sed min li elektis mem!

Lian pipon forĵetos mi al la ĝet’,  
Mi sukcenon donos al vi,  
Sed lin ne forlasos el silka ret’ –  
Li restos ĉiam kun mi!

Vi ne ĝisatendos lin, sed, en spit’,  
Vi venados al Blanka Rok’,  
Ĝis la grizaj haroj, la lasta spir’  
Lin atendos en sama lok’.

Vi ja estas obstina en sama grad’  
Kaj iam, al fora mar’  
Vi postsekvos lin laŭ la sama pad’  
Inter balanciĝanta ondar’.

Via gent’ obstina al mara senlim’  
Daŭrigos la vojon ĝis rand’...  
Kaj iu trovos la pipon de li  
Sur la sabla-sukcena strand’.



*Tradukoj de Tatjana Auderskaja*



### KIE NE ESTAS VENTO

*Leonid Kaganov<sup>1</sup>*

*Ĉe Volokolamska ŝoseo staras monumento.  
Ĉiudimanĉe homoj venas al ĝi kaj silente metas florojn.*

\* \* \*

Tute sendube, antaŭ mi estis la plej luksa pordo el ĉiuj, kiujn mi vidis ĉi tie. Certe, la dikan kurtenon el vilaj fadenoj estus ne tute ĝuste nomi pordo laŭ homa kompreno. Sed la kubuloj ial faras en siaj konstruaĵoj ĝuste tiajn pordojn. Ĝis nun eĉ unufoje mi ne rimarkis ĉe ili ion fermiĝantan hermetike. Eniru, kiu volas... Sed tiu pordo estis neordinara. Unue, la embrazuro estis grandega – preskaŭ samalta kiel homo. Sed ja la staturo de la kubuloj malofte atingas unu metron. Sekve, la pordo estas ĉefa. Ankaŭ la fadenoj mem estis pli multkoloraj ol kutime – la pordo rebrilis je ĉiuj koloroj de la ĉielarko. Mi ne havis dubon, ke tiu pordo kondukas al la ĉefa kubulo – mi ja ne scias, kiel ili nomas ĝin, ĉu prezidento aŭ generalisimo. La vortaro ne povis doni klaran informon pri tio.

Mi levis pli alten la funelon de la plasma tranĉilo, profunde enspiris kaj por momento haltigis la spiradon. La koro bategis. Estas nenio por perdi. Tempas. Mi elsaltis el la niĉo sur la molan plankon, transkapiĝis kaj jetis min al la pordo. Ĝis ĝi restis ĉirkaŭ tri metroj. La kubuloj havas bonegan reagokapablon. Sed mi – havas plasman tranĉilon.

La fadenoj mole glitis laŭ la vizaĝo. Kaj glitadis plu, kvazaŭ mi impetis antaŭen tra kampo de matura tritiko, ludante tuŝludon, kiel en la infanaĝo. Kutime la ŝnurpordoj de la kubuloj longis ĉirkaŭ metron kaj duonon, sed tiu kurteno longe ne finiĝis. Finfine antaŭe ekbriletis lumo, kaj en la sekva momento mi elkuris en grandan rondan halon. Proksimume tion mi imagis. Rekte antaŭ mi sidis granda kubulo. Feliĉe – sola, neniu krome estis ĉi tie. Tio estis eble la plej granda ekzemplero el tiuj, kiujn mi vidis. Kiel ĉiuj kubuloj ĝi estis helruĝa. Ĝi ne estis kubforma – ĝi pli similis grandan guton, kiu falis desupre el iu pipeto kaj jam komencis disflui sur la planko, sed tiumomente ŝtoniĝis. Iom plata globo kun pinta nazo, direktita supren kaj iomete flanken. Sed perdi tempon ne eblis. Mi saltis

---

<sup>1</sup> Leonid Kaganov (nask. 1972) estas moderna rusia fantasta verkisto, satiristo, poeto, scenaristo, gvidanto de televidelsendoj.



flanken kaj sekvamomente jam falis ĉe la muro flanke de la enirejo.

Verdire, mi antaŭripensis ĉion krom la unua frazo, kiun mi diros. Kaj nun la karbon obsedis nur la stulta frazo “Ne moviĝu, tio estas rabo!”

– Ne moviĝu, tio estas atako!!! – kriegis mi, kaj la Vortaro tuj ekĉirpis en la kubula lingvo.

Pasis sekundo. La kubulo ne moviĝis. La artikulo estis entirita. La okula tigo kaŝita. Per kio ĝi nun rigardas kaj kien – ankaŭ tion mi ne povis kompreni.

– Ĉu vi estas ĉi tie la ĉefo? – kriegis mi.

Responde eksonis lirla trilo, kaj tuj en la orelo eksonis la Vortaro, kiu diris per la neripetebla voĉo de Paŝka: “Jes, mi estas ĉi tie la ĉefo!” Mi jam delonge kutimiĝis, ke la Vortaro tradukis ajnajn replikojn de la kubuloj per plej trankvila tono, sed ja al la voĉo de mortinta Paŝka mi al kutimiĝi ne povis, nun mi denove ektemis. Sed la trilo daŭris plu, kaj la Vortaro aldonis: “Mi bezonas kelkajn minutojn por konservi informojn. Poste mi estos preta”.

Tiumomente el nerimarkebla aperturo en la karapaco eliĝis longega faldebla artikulo kaj impetis antaŭen. La kubulo faris eraron. Se ĝi moviĝus ne tiom abrupte, mi verŝajne komence provus kompreni, kion ĝi al mi diris, kaj certe mi perdus onojn de sekundo. Sed ĝi eligis la artikolon je unu rapida movo. Kaj mi aŭtomate premis la ĉanon.

Maldika strio de blindige blua plasmato klakis kiel vipo.

La reagokapablo de la kubuloj ĉiam min mirigis – ĝi tamen sukcesis entiri la radikon reen. Sed en tiu loko, kiun ĝi strebis atingi, nun eligis fumon rompaĵoj, kraketante je bluaĵ fajreroj. Mi malfrue komprenis, ke tio estis la plato de la terminalo. Tio estis tute neĝustatempe – mi ne sciis, ĉu estas proksime rezerva terminalo. Sed sen la terminalo mia plano tute perdus la sencon.

– Homo, mi vere bezonas antaŭ la perejo konservi mian informon, – diris la Vortaro en mia orelo kviete kaj prudente.

– Ne moviĝu! – roris mi, iom post iom moviĝante laŭlonge de la muro por teni la enirejon celata. – Moviĝu nur laŭ mia komando! La terminalojn ne tuŝu! Kun neniu interkomuniku!

– Homo, mi hodiaŭ havas multe da nekonservitaj informoj. Antaŭ la perejo mi devas transdoni ilin al mia anstataŭanto, – diris en la orelo iomete mirigita voĉo de Paŝka.

– Des pli bone, – siblis mi venĝeme. – Se por la civilizo de la kubuloj estas valora ĝia supera reganto kaj ties informoj, ili aŭskultos min. Se ne – vi mortos.

– Do, ĉu vi ne intencas mortigi min tuj, homo? – respondis la kubulo, kaj en ĝia tono aŭdiĝis senpeziĝo.

– Mi pretas mortigi vin ajnsekunde, – respondis mi honeste kaj firme. – Mi ja ne havas kion perdi, sinjoro prezidento. Aŭ... Kiel oni kutime titolas vin? – Mi strabe rigardis la kolbon de la tranĉilo – restis ankoraŭ multe da ŝargo. – Flankeniru al la muro! – ordonis mi al la kubulo.

Ĝi obeeme alrampis la muron, mole kaj etpaŝe frapadante la plankon per sia gutforma postaĵo – kiel stabilo. Mi streĉaŭskultis – malproksime trans la fadenvualo aŭdiĝis neklaraj bruoj, sed persekuto ankoraŭ ne estis. Nun mi povis ĉirkaŭrigardi en la kabineto. Certe, tio estis kabineto, kaj apud ĝiaj muroj amase staris objektoj tre similaj al ŝrankoj kun multaj etegaj bretoj. Plejparto de la bretoj estis okupitaj. Aŭ ĉu tio estas ĉeloj, kie oni kreskigas idaron, kaj antaŭ mi estas la ĉefa femalo?

– Ĉu estas ĉi tie rezerva terminalo? – roris mi.

– Estas, – tuj respondis la kubulo. – Ĉi tie estas ses funkciaj terminaloj.

Mi ĉirkaŭrigardis, sed la terminalojn ne vidis. Cetere, nur niaj komputiloj similas unu al la alia, sed la terminaloj de la kubuloj estas plej diversaj.

– Ne moviĝu! – roris mi denove, svinginte la tranĉilon, por ke tio sonu pli konvinke.

Poste mi aliris la ŝrankon kaj provis movi ĝin. La ŝranko evidentiĝis esti peza, mi sukcesis movi ĝin nur je paro de centimetroj.

– Tio estas gravaj libroj, homo, – voĉis la kubulo.

– Des pli bone. Venu ĉi tien! Helpu movi la ŝrankon al la enirejo!

– Por kio ni movu la ŝrankon al la enirejo?

– Ne parolu! – roris mi. – Plenumu! Moviĝu malrapide kaj laŭ mia ordono! Nur unu via abrupta movo – kaj mi forbruligos kaj vin, kaj ĉiujn ŝrankojn ĉi tie!

– Mi obeas, – respondis la kubulo kaj komencis malrapide proksimiĝi.

Movi la ŝrankon estis malfacile. Mi ĉiam atendis atakon – mi strebis ekstari malproksime kaj, puŝante perŝultre, ne forprenis la fingrojn de la tranĉila ellasilo. La ŝultro iom post iom rigidiĝis – verŝajne ĝin tamen trafis ilia abomena energiradio.

La kubulo ataki ne intencis.

Ni baris la trairejon per la ŝranko. Poste per dua ŝranko. Baldaŭ elkreskis tuta barikado, kaj la muroj nun estis nudaj. Malantaŭ la ŝrankoj troviĝis neniu kaŝitaj truoj, sed malgraŭ tio mi estis atenta. Mi ordonis al la kubulo forruliĝi al la malproksima muro. Mi mem sidiĝis kaj reakiris la spiron. Spiro eble ne estis, mi jam menciis tion. Sed anhelon mi sendube sentis.

– Neniigi librojn estas rabia krimo, – informis la kubulo. – Tio estas kolekto de historiaj ekzempleroj.

– Tre bone, – kapjesis mi. – Mi promesas neniigi ilin kune kun vi, se la kubuloj ne komencos plenumi miajn kondiĉojn!

– Sed kial vi pensas, ke la kubuloj komencos plenumi viajn kondiĉojn? Kial vi pensas, ke por la socio tiom gravas mia ekzisto?

– Ĉar vi, dika kanajlo, loĝas en la plej granda domo, en la plej centra etaĝo, en la plej granda ĉambro!

– Mi ne vidas logikon, – diris la kubulo.

## KIEL TIO KOMENCIĜIS

Ekde antikva tempo diversaj popoloj de la Tero alkutimiĝis nomi homojn de fremda gento alilanduloj, emfazante per tio, ke tiuj aperis el foraj landoj. Poste anstataŭ la malnovmoda "alilanduloj" venis la moderna "eksterlandanoj", sed ankaŭ ĝi emfazis nur geografian distancon. Kaj tio facile eksplikeblas: homoj alkutimiĝis trovi fremdulojn, nur vojaĝante. Aŭ male, renkonti gastojn, kiuj trairis longan vojon. Ĉu povas esti alie?

Tute ne estas mirinde, ke eĉ se la teranoj de la dudekunua jarcento estis pretaj trovi fremdan civilizon, ili atendis ĝin ie malproksime, trans foraj steloj. Sed eĉ sur la Tero la problemoj de distancoj estis rapide perdanta sian signifon: aviadiloj kunigis la kontinentojn dum kelkaj horoj, kaj informoj flugadis helpe de interreto eĉ kun tute fulma rapideco. Krome, tiu rapideco povis dependi de io ajn, sed nur laste – de la kvanto da kilometroj. Tamen ni plu kredis, ke la plej neatenditajn gastojn ni trovos nur en la plej malproksimaj lokoj, kaj pro tio ni kun espero rigardis tien, kie la distancoj estas plej grandaj – en la ĉielon. Ni rigardis kaj revis pri rapidaj kosmoŝipoj, kiuj iam helpas al ni trovi malproksimajn intelektofratojn. Aŭ male.

Generacioj de sciencfikciaj verkistoj fervore prezentadis al ni bildojn de interstelaj flugoj kaj kortuŝaj renkontiĝoj kun fremdaj kosmoŝipoj en foraj partoj de la galaksio. Rezultoj de tiu epokokrea renkontiĝo estis atendataj precize du: aŭ amika turismo, aŭ – kruela batalo de du civilizoj sur la batalkampo de la interstela spaco kaj apudlimaj regionoj. En ajna kazo la ĉefa problemoj estis distanco, distanco kaj ankoraŭ foje distanco. Ĉaroj, ŝipoj, raketoj. Senfortigaj vojaĝoj kaj senlimaj distancoj – nur tiu imago venis en niajn kapojn tuj post kiam ni pensis pri renkontiĝo kun io nekonata. Nun ja estas klare, kia superstiĉo estis atendi forajn gastojn, rigardante la plafonon. Ja gastoj kutime frapas la pordon... Tiu pordo aperis apud Volokolamsko, proksime al la somerdometa vilaĝo "Hidroinĝeniero", kaj oni nomis ĝin Portalo.

Mi ĝis nun ne scias, kie loĝas la kubuloj efektive. Ĉu ili loĝas en paralela mondo aŭ sur planedo de fora stelo? Ĉu en la pasinto aŭ en fora estonto? Ĉu eble ilia universo estas mikroskopa kaj lokiĝas en la nukleo de unu el atomoj, troviĝantaj sur la Tero aŭ en la kosmo? Aŭ male, nia Galaksio estas nur unu el atomoj de ilia mondo? Aŭ ĉu ilia mondo estas la plasma tripo de nia Suno? Aŭ ilia mondo estas vivanta organismo, kaj la kubuloj estas nur raciaj sangoĉeloj de iu pleŭronekto? Tiu penso trakuris mian cerbon, kiam mi unuafoje vidis iliajn korpegojn similajn al eritrocitoj. Aŭ ĉu ilia Universo estas virtuala kaj naskiĝis en la sino de potenca tera komputilo, kies posedantoj eĉ ne supozas tion? Aŭ ĉu ilia mondo estas energia kaj aperis iam por ono de sekundo ĝuste en tiu fulmo, vidinte kiun Tjutĉev verkis sian senmortan versaĵon "Mi ŝatas fulmotondron majan..."? En ajna kazo tio tute ne gravas. Kia diferenco, kie ĝuste en la spaco-tempo troviĝas la Universo, se ĝiaj racihavaj loĝantoj sukcesis konstrui efikan Portalon inter la

mondoj? Portalon, kiu reduktis la problemon de vojaĝo al unusola paŝo internen de la netravideble nigra truo, pendanta en la aero rande de senmastra kampo, apud kavo kun rubo kaj nefunkcia bariero ĉe la enveturejo de la somerdometa vilaĝo nomata “Hidroinĝeniero<sup>2</sup>”. Ridinda nomo, ĉar la vilaĝo sen ajnaj truoj inter la mondoj jam antaŭ eble tridek jaroj adiaŭis ĉiujn siajn inĝenierojn kaj transformiĝis en senordan miksaĵon de brikaĵ koteĝoj, apartenantaj al mezklasaj urbanoj.

Estas bone, ke la tempo sur la Tero kaj en la mondo de la kubuloj fluas same egalrapide. Kvankam mi ne scias, kiel fluas la tempo efektive – estas tute eble, ke la tempo por vojaĝanto estas intence malrapidigata aŭ rapidigata helpe de la nekonata interfaco, funkciiginta la Portalon. En mallarĝaj koridoroj la kubuloj moviĝas pli rapide ol homoj, sed ne tiom ke manbatalo perdu sencon. Des pli se oni dum kvin jaroj okupiĝis pri tekvondo. Kaj se temas pri la leĝoj de fiziko, mian korpon mi sentas en la mondo de la kubuloj iomete alie. Nurnure iomete. Mi eĉ ne povos klarigi, kio en mi ŝanĝiĝis, kiam mi paŝis en la truon de la Portalo. Ĉu iomete pli densas la aero? Ĉu pli glata palpe, preskaŭ glita komencis ŝajni al mi mia propra haŭto? Ĉu iomete pli nekutima evidentiĝis la trajektorio, kiam mi saltas supren kaj denove surpiediĝas? Ĉu iomete pli neegalrapida iĝis la gambosvingo? Mi ne povas ĵuri, ke efektive estas tiel, ĉar ĉiuj nekutimaj sentoj troviĝas ĉe la plej fora limo de mia percepto. Sed la plena foresto de vento kaj trablovoj estas senduba fakto. Eĉ se mi blovos plenforte al la polmoj, nenio okazos, kaj mian spiron mi ne sentos. Ankaŭ odoroj ĉi tie ne estas. Sed sonojn mi aŭdas, kaj mi spiras ĉi tie facile, kaj la aero ĉi tie ŝajnas freŝa. Sed ĉu tio estas aero? Aŭ ĉu nekonata forto ŝajnigas la ĉirkaŭan substancon al mia korpo kvazaŭ aeron? Pensi pri tio mi ne volas. Tute same mi neniam volis pensi, laŭ kiaj tuboj, fostoj kaj putoj etendiĝas la kabloj, kiuj portas elektronikajn impulsojn, dum mi kuras en interreto tra paĝaroj de diversaj kontinentoj. Dum la labora tempo – certe jes, sed ĝenerale – mi tute ne emis pensi pri tio. La teknologio funkcias, la TTT-ejoj atingeblas – do, estas bone. Jes, komence mi timis, ke la civilizo, kreanta tiajn neimageblajn portalojn, verŝajne tiom profunde ekkonis la leĝojn de la mondoj, ke ĝi kapablas neniigi la homaron unumomente. Sed la kubuloj ne povas neniigi eĉ min, eĉ interne de sia mondo – ili povas nek malkovri mian situon, nek malŝalti mian spiron. Verŝajne la kluza portalo, prilaborinte la molekulan baĉon de mia korpo kaj enlasinte ĝin en la alian Universon, ne regas ĝian pluan sorton. Kaj eble ankaŭ la principo de la funkciado de la Portalo estas ne tiom senlime komplika, kiel ŝajnas al ni, ne sciataj ĝian aranĝon? Povas esti, ke por konstrui Portalon tute ne nepre necesas perfekte scii ĉiujn leĝojn, laŭ kiuj vivas la Universo? Ja ankaŭ meti kablون en kanalizacia kolektotubo multege pli facilas ol fari korektan TTT-ejon, tion sukcesos fari eĉ seruristo. Sed labori en interreto – krei TTT-ejojn,

---

<sup>2</sup> Komence aparteninta, evidente, al entrepreno aŭ sindikato de hidroinĝenieroj.

malfunkciigi servilojn – tion seruristo ne scipovas. Nu, kaj peni kapti kodrompistojn, sidante kun tranĉtenaĵlo, estas okupo eĉ tute senutila.

La Portalo aperis dum majfesta tago, kiam en "Hidroinĝeniero" estis aparte multe da homoj – en ĉiu koteĝo ludis muziko, ie oni kantis, ie oni rostis ŝaŝlikon. La nekutiman fenomenon rimarkis grupeto de adoleskantoj, kiuj trinkis bieron sur benko apud la bariero. Laŭ ilia rakonto en la aero super la tero aperis punkto, el kiu senbrue elvolviĝis nigra rondo ĉirkaŭ du metrojn en la diametro. Ili singarde proksimiĝis por vidi pli bone. Evidentiĝis, ke la rondo estas tute plata, kaj ĝi ekzistas nur unuflanke: se aliri de malantaŭe, tie estas nenio. Eĉ ŝtonetoj, ĵetitaj de la malantaŭa flanko, traflugis senobstakle. Sed botelo, ĵetita rekte en la mallumon, malaperis senspure. Poste en matenaj ĵurnaloj oni nomis la Portalon "la Nigra spegulo".

Poste el la Portalo falis purpura kesto simila al valizo kun malglataj trivitaj flankoj. Ĝuste en tiu momento unu el la geknaboj elspiris: "Kio estas tiu kubulo?" Ankoraŭ neniu pensis, ke tio estas vivanta estaĵo. Poste evidentiĝis, ke kubuloj havas plej diversajn formojn, sed ĝuste kvadratan – plej malofte. Sed la vorto iĝis uzata.

Plue en la rakontoj de la adoleskantoj estas malkovracioj. Iuj diras, ke ili kuris por peti helpon, aliaj klarigas, ke ili rapidis por preni fotilon, kaj ambaŭ knabinoj, Ksenjo kaj Danjo, agnoskas, ke ili simple terure ektimis kaj forkuris. Tiel aŭ alie, apud la malfermita portalo por momento neniu restis, kaj la kubuloj ĉiam plu aperadis. Kiam al la bariero elkuris homamaso, apud la Portalo sur la tero staris dekduo da purpuraj korpoj plej diversformaj.

Oni rakontas, ke la kubuloj ekmoviĝis, ekkrakis kaj elprenis glavojn similajn ĉu al mallongaj kaj larĝaj rubandoj, ĉu al ĉinaj tranĉiloj por haki legomojn. Per tiuj glavoj la kubuloj sen ajna paŭzo, serioze kaj koncentrite hake dispecigis unu la alian, krake frakasante siajn karapacojn. La lasta pluvivanto per unu lerta bato dishakis sin mem.

Preskaŭ dum du semajnoj "la Nigra spegulo" silentis. Tie laboris sciencistoj, deĵoris militistaj fakuloj, tien impetis neimageblaj amasoj de ĵurnalisto kaj gapuloj. Biologoj, kiuj studis la restaĵojn de la kubuloj, raportis, ke tiuj sendube estis vivaj estaĵoj tre kompleksaj. Supre iliajn korpojn kovris karapaco, kaj sub ĝi estis io simila al nutra bulĵono, en kiu flosis multaj histoj, kompleksaj retoj kaj aliaj nekompreneblaj organoj. La biologoj unuanime nomis ilin organeloj: la eksterteranoj ne estis plurĉelaj estaĵoj, kaj la histoj de iliaj korpoj ne konsistis el kunmetitaj elementoj. Sub la karapaco de la eksterteranoj estis kaŝita elŝovebla artikolo plej simila al bambua fiŝkano, se ĝi estus ruĝa kaj faldiĝus, kiel faldebla mezurrubando. Krom la artikolo sub la karapaco estis granda okulo sur tigo kaj ankaŭ multaj malgrandaj facetoj. Estis tie oreloj kaj multaj aliaj nekompreneblaj organoj, kiuj plej verŝajne laŭbezone aperis el multaj aperturoj de la karapaco, kovritaj per ostaj kurtenoj plej diverŝipaj kaj diversformaj.

"La Nigra spegulo" daŭre pendis kaj nenien kaŝiĝis. Oni ĵetadis en ĝin

sensilojn kaj mezurilojn, sed ili montris nenion – la nigra surfaco tralasis nek elektronojn laŭ etenditaj kabloj, nek radiandojn, nek lumon, nek sonon. Sed memmova roboto, kiu iris en la Portalon kaj baldaŭ revenis, alportis riĉegajn videoregistraĵojn.

Evidentiĝis, ke en la mondo de la kubuloj ne estas ĉielo. Anstataŭ ĝi je centmetra alteco troviĝas sama ŝtona solidaĵo, kia troviĝas sube. La kubuloj konstruas siajn domojn inter la ĉielo kaj tero, tiuj similas al arbotrunkoj aŭ kolonoj pli dikaj supre kaj malsupre. Tamen ankaŭ en la tero kaj en la ĉielo la kubuloj fosas kavojn – tie ili havas tenejojn, uzinojn, laboratoriojn kaj simple plej kompleksajn retojn de koridoroj. Ĉu io estas sub la nivelo de la grundo aŭ super la supra solidaĵo, – mi ne scias.

En la mondo de la kubuloj estas lume, sed ne estas fontoj de lumigo. La lumo venas de ĉie. En la spaco inter la malsupro kaj supro, en la koridoroj – la aero mem ŝajnas lumi. La teknologio de la kubuloj estas en bona stato, tamen ili ne elmontras teknikaĵojn, sed preferas munti ilin en murojn aŭ ŝovi en nerimarkeblajn ujojn de neregula formo. Ankaŭ la nocio “vestoj” ne ekzistas. La kubuloj havas nenian komprenon pri simetrio. Iliaj korpoj estas plej diversformaj, kaj ankaŭ dum la kreado de konstruaĵoj kaj aparatoj la kubuloj ne interesiĝas pri la beleco de la formoj.

## **KONTAKTA GRUPO**

Interŝanĝi kontaktajn grupojn proponis la kubuloj – ili aperis el la portalo, klarigis geste, kion ili volas, kaj foriris. Ili lasis donace interesajn objektojn de sia tekniko. Tiam unuafoje evidentiĝis, ke la kubuloj estas havas racion – la skarlatataj valizoj, hakantaj unu la alian en pecojn, malmulte similis raciajn estaĵojn, unue oni konsideris ilin robotoj aŭ hejmaj bestoj. Tempis pripensi, kion signifis tiu unua demonstrado. Sed neniu havis ideojn.

Kvankam moviĝi tra la Portalo estis afero de sekundoj, kontaktan grupon oni formis longe. Pri tiu afero okupiĝis, memkompreneble, la rusia sekureca servo. Kiel mi nun komprenas, se la kubuloj eksciis tion, ili trovus en tio ankoraŭ unu konfirmon de nia agresemo. Ili ne sciis ankaŭ, ke inter la dek du volontuloj duono estis militistoj. Cetere, la militistoj de nia grupo en la vivo evidentiĝis ege agrablaj kaj ĉarmaj homoj, kvankam antaŭe mi ial opiniis, ke ĉiuj anoj de sekretaj servoj estas mornaj stultuloj kun epoletoj.

Krom la militistoj oni decidis inkludi en la kontaktan grupon ses civilajn profesiulojn: psikologon, fizikiston, kemiiston, biologon, lingviston kaj cibernetikiston. Tiu sesa estis mi. Ankaŭ la militistoj ne estis ordinaraj: unu estis tradukisto, alia psikologo, tria milita medicinisto, kaj pri la fakoj de la ceteraj oni ne informis eĉ nin. Mi memoras, ke en la dua tago de nia konateco mi demandis nian Arkadion rekte, kio estas lia milita fako. Arkadio larĝe ridetis, kaj en la sekva momento nia interparolo glitis al iu tre interesa, sed tute ne memorfiksita, fremda

temo. Eble ĝuste tio estis lia fako – lerte eviti demandojn.

Min rekomendis mia infanaĝa amiko Paŝka – profesie filologo, incline verkisto kaj muzikisto. Li mem partoprenis, memkompreneble, kiel lingvisto. Paŝka certigis la estraron, ke pli bona cibernetikisto ne troveblas, des pli ke mi kompetentas samtempe pri komputado kaj pri elektroniko. Mi poste komprenis, ke mi taŭgis ankaŭ laŭ aliaj parametroj – mi estis juna, energia, atleta, ne edziĝinta, kaj ne estis stelulo de la scienco, kiun la homaro timus perdi. Tiun delikatan nuancon mi ekkonsciis nur kiam Paŝka konfesis iom malĝoje, ke se li estus talenta verkisto, oni ne inkludus lin en la grupon... Mi tiam pensis, ke li ŝercas, sed nun mi pensas, ke niaj ĉefoj antaŭsentis, kiel ĉio ĉi povas finiĝi. La intervjuo daŭris kelkajn horojn, kaj tagon poste oni informis min, ke mia kandidateco estis aprobata.

Oni kunvenigis nin kaj preparadis dum du tagoj – ni pasis trejnadojn kaj instrukciadojn. Poste ankoraŭ dum diurno ni atendis permeson. Eble la kubulojn suspektigis la fakto, ke ni malfruigis je unu diurno. Ja la kontakta grupo de la dek du kubuloj eliris el la Portalo precize je la interkonsentita tempo, dum sunleviĝo – rekte al ni, antaŭ la objektivajn de televidaj kameraoj, al amaso de floroj kaj la sonoj de la rusia himno. Oni tuj forveturigis ilin en esploran centron kaj por ekskursoj.

Sed nian kontaktan grupon oni malfruigis pro internacia skandalo. UN indignegis kaj postulis, ke la grupo inkluzivu reprezentantojn de ĉiuj grandaj ŝtatoj, aludante evidente pri Usono. Precize diurnon daŭris kverela disputo je la nivelo de ŝtatestroj, sed Rusio estis firma: estas nia teritorio, kie aperis la Portalo, kaj diversaj eksterlandanoj reduktos konkordan interkomprenon en la grupo, kio povas negative impresi al la intelektofratoj. Sed efektive la kialo estis klara al ĉiuj, sufiĉis legi nian gazetaron, kiu kriis, ke Rusio iam unua venis en la kosmon, kaj nun ĝi estos la unua, kiu organizos plenvaloran kontakton kun la intelektofratoj. Kaj kvankam UN esprimis kategorian proteston, tagon poste la prezidento donis permeson, kaj la grupo unu post la alia eniris la Portalon.

## **LA MONDO DE LA KUBULOJ**

La mondo de la kubuloj estas bela. Iliaj domoj, kiel mi jam diris, similas al kolonoj, kaj la solidajon malsupre kaj supre ĉirkaŭvolvas sistemo de trairejoj, koridoroj kaj liftoj. Kelkaj koridoroj estas veturigaj – la planko tie moviĝas. Kvankam la korpoj de la kubuloj estas kovritaj de karapacoj – aŭ eble ĝuste tial? – ili ŝatas ĉion molan. Ĉiuj surfacoj estas faritaj el molaj elastaj materialoj similaj al gumo. Kaj la enirejojn de loĝejoj ili faras el molaj fadenoj, pendantaj desupre ĝis la planko.

En la unua tago ni interkompreniĝis geste. Unu el niaj militistoj provis demandi, kiel ili batalas kontraŭ ŝteloj kaj krimoj ĝenerale, sed ne ricevis respondon. Ni pensis, ke ĝi simple ne povis klarigi tiom malfacilan temon

perŝingre, kvankam iomete poste evidentigis, ke la kubuloj tute ne rapidas respondi al niaj demandoj, ili nur demandas nin. Mi supozis, ke ili kondukos nin por ekskurso, montros urbojn, ĉiutagan vivon, artajn verkojn... Sed oni montris al ni nenion tian. Cetere, arto tie ŝajne tute ne ekzistis, kaj kio al ni komence ŝajnis bela muziko, sonanta en la koridoroj, estis novaĵelsendoj. La kubuloj vivis tre modeste, mi eĉ dirus: tre spartanece.

Provizojn de manĝaĵo kaj trinkakvo ni havis en komuna kontenero. Oni insiste proponis al ni disiĝi kaj aludi krome, ke ni estos dividitaj por longa tempo. Tion ni ne planis, sed kion fari, se la mastroj preparis vastan programon por ĉiu el ni? Estis demando: kiel dividi la provizon? Dum ni pripensis tion, la kubuloj mem sentripigis nian konteneron kaj dispartigis la provizon, metinte la partojn en portebajn ujojn. Tute iomete de la manĝaĵo ili forportis ien en malgrandaj cilindroj tre similaj al la provtuboj de teraj laboratorioj. La unuan ujon kun la manĝaĵo ili donis al Arkadio, kiun ili tuj sentis estro. Memkompreneble post tio ne restis dubo, ke ankaŭ la kubuloj havas dividon je rangoj. Kaj dubo pri tio eĉ ne estis. La duan ujon ricevis Oksana, psikologo kun mirindaj verdaj okuloj kaj konstanta bonkora rideto sur la molaj amvakaj lipoj. Kvankam ni konis unu la alian nur tri tagojn, mi preskaŭ enamiĝis al ŝi. La trian ujon ili donis al mi, kaj ankaŭ min ili tuj forkondukis, same subteren. Tiu distribuado de la porcioj iom similis al militista trejnado. Sed tio ne maltrankviligis.

Baldaŭ mi trafis en rondan oficejon, kie en angulo staris io simila al poto, kaj apude – mola lito-kuŝejo. La kubuloj malaperis. Mi pensis, ke ili tuj revenos, kaj komenciĝos dialogo, sed neniu eniris al mi. Tempo pasis, kaj mi komencis pensi, ke ili forgesis pri mi. Kiel tio povus esti? Havante nenion por fari, mi komencis marŝi laŭlonge de la ĉambro laŭ la elasta planko simila al matoj en gimnastejo. Post kelka tempo mi sentis, ke mi ne povas simple paŝi sur la matoj nenifare – mi komencis kaŭriĝi, fari puŝlevojn, spagaton, eĉ iomete paŝis sur la manoj, kvankam mi timis, ke por oficiala reprezentanto de la Tero tiu konduto estas malserioza. Sed la ĉefa punkto de nia instrukcio tekstis: se vi ne scias kiel konduki, preferindas konduki nature. Mi estis certa, ke la kubuloj observas min, do ili sciu, ke foje homoj sportas.

Iom post iom la ĉambro pli kaj pli memorigis al mi prizonan kameron, kaj nur la dika fadenamaso anstataŭ pordo atestis, ke neniu tenas min enŝlosita. Sed se estas tiel, ĉu mi iru promeni? Ja neniu rapidas distri min. Aŭ ĉu tio estos konsiderata kiel nepermesita esplor-eliro? Fine mi elpensis konvinkan argumenton: eble la kubuloj faras eksperimenton por ekscii, kiagrade al homoj estas karakteriza la esplora instinkto, kiom ilin interesas la mondo de la intelektofratoj? Alivorte, ili kontrolas, kiom mi sidos en la ĉambro nenifare.

Mi eliris tra la pordo kaj direktiĝis laŭ la koridoro, memorfiksante la vojon. La koridoroj estis malplenaj, kaj pro tio mi komencis senti min spiono. Mi preferus promeni inter densa amaso de lokaj loĝantoj, rimarkante, ke ili rigardas min, kaj ridetante reciproke. Subite la koridoro elkondukis min en larĝan



balkonon, kiu ĉirkaŭis grandegan halon, troviĝantan sube. Mi alproksimiĝis al la balustrado kaj haltis, absorbita de la vidaĵo.

La halo aspektis kiel tipa laboratorio – tie kaj ĉi tie altis stativoj de nekompreneblaj ujoj. Aroj de kubuloj afereme moviĝis inter la aparatoj kaj terminaloj, kaj en la mezo sur larĝa tablo kuŝis Paŝka – mi rekonis lin laŭ lia ĝinzo. Li kuŝis senmove. La kruroj de Paŝka estis videblaj, kaj lia supro estis kaŝita en dika hemisfero kun faskoj de adaptiloj similaj al bukliloj. Mi tuj konjektis, ke tio estas loka analogo de tomografo, kiu nun esploras la cerbon de Paŝka. Mi ankaŭ rimarkis, ke la gamboj de Paŝka estas fiksitaj al la tablo, sed tiam mi ne atribuis signifon al tio – ŝajne ankaŭ en niaj klinikoj oni fiksas esploratojn. Verdire, en tiu momento mi enviis al Paŝka – ja la intelektofratoj esploras ĝuste lian cerbon. Mi ankoraŭ longe rigardis malsupren de la balkono, sed tie nenio ŝanĝiĝis. Paŝka daŭre ne moviĝis, kaj la kubuloj daŭre afereme umis ĉirkaŭ li. Min ili ne rimarkis, aŭ eble ili ne vidigis tion.

Subite malantaŭ mi eksonis trilo, kaj mi turniĝis. Antaŭ mi staris anguleca kubulo kun malproksimen etendita artikolo. Ĝi klakis per la maldikaj pinĉiloj por allogi mian atenton, kaj poste montris al la profundo de la koridoro per tiom ĝentila, sed firma gesto, per kiu niaj milicianoj proponas iri al la milicejo por esti oficiala atestanto.

Levinte la ŝultrojn, mi sekvis ĝin, dumvoje provante klarigi per gestoj, ke mi plene komprenas, ke esplori la organismo gravas, kaj ankaŭ min tiu esploro tre interesas. La kubulo silentis. Akompaninte min ĝis la ĉambro, ĝi montris al la kuŝejo kaj foriris. Mi ne kaŝu, ke mi seniluziiĝis. Tute ne tian kontakton kun la intelektofratoj mi imagis.

Mi trinkis sukcon el vazo, maĉis multkalorian bakaĵon, kiu estis inkludita en nia pakita manĝaĵo, kaj poste kuŝiĝis sur la liton kaj ordonis al mi ekdormi. Mi sukcesis ne tuj – efikis la streĉo. Sed mi tamen ekdormis. Mi sonĝis mian bonan konatulinon, restintan sur la Tero kaj havantan nenian rilaton al la kontakta grupo. La sonĝo estis tre personeca, kaj mi tute ne menciis ĝin, se ne estus detalo: la konatulino en la sonĝo dancis, iom post iom nudigante sin, kaj kiam sur ŝi restis nur ŝia kalsoneto kaj mamzono, ŝi gracie jetis siajn brakojn malantaŭ la dorson, sed ne sukcesis malfermi la agrafon. Ŝi ĉesis danci, haltis, nerveze fingrumante malantaŭ sia dorso, kaj poste kriis neatendite per vira baso: "Helpu!" Mi komence ekimpetis al ŝi por helpi pri la agrafon, sed ŝi basis: "Ne!!! Ne!!!" – kaj mi haltis perplekse. Post sekundo ŝi kriis denove, abrupte transirante de baso al ŝriko plena de malespero: "Helpu!!! Dio mia, helpu almenaŭ iu!!!!!!!" En la sonĝo mi jetis min al ŝi, kaj la sekvan momenton mi vekigis kaj konsciis, ke mi sidas sur la kuŝejo, kaj mia koro freneze bategas.

Ĉirkaŭe estis silento. Mi trankviliĝis kaj longe kuŝis kun malfermitaj okuloj, pensante: ĉu mi demandu morgaŭ psikologinon Oksana, se mi vidos ŝin, kion povus signifi tia sonĝo? La sola afero, kiun mi ial ne volis klarigi al Oksana, estis, kiu estas tiu virino – ni disiĝis antaŭ multaj jaroj, kaj ekde tiam mi strebis ne

pensi pri ŝi. Mi komencis cerbumi, kial mi ne volas rakonti ĝuste al Oksana pri mia iama virino, kaj mi ne rimarkis, kiel mi ekdormis.

Min vekis la kubuloj – ili alportis spiralon el brila plasto, kiun ili surmetis sur mian kapon kiel ĉapelon, enmetinte unu finon en mian oreilon. Farinte tion, la kubuloj iris flanken je kelkaj paŝoj, kaj unu el ili ekgrincis kun ruladoj. La sekvan momenton en la orelo eksonis konata voĉo:

– Bonan tempon de la diurno! Provu uzi la vortaron.

– Paŝka! – kriis mi. – Mi aŭdas vin! Kiel vi fartas?

La spiralo sur la supro faris serion de ruladaj sonoj, kaj mi komprenis, ke dum la nokto la kubuloj konstrukiis aŭtomatan tradukilon.

Ekde tiu momento komunikado iĝis pli facila. La vortaro ne sciis ĉiujn vortojn, sed rapide lernis tutsimple aŭde. Jes, komunikado iĝis pli facila, sed aliflanke mi komencis farti pli kaj pli malkomforte – la kubuloj preskaŭ ne respondis miajn demandojn, sed penis demandi tro multe pri nia vivo. Komence mi respondis volonte, poste pli lakone, kaj fine mia pacienco finiĝis. Mi sugestis alternigi demandojn. La kubuloj respondis, ke tio nun senutilas, sed gravas paroli pri la tera teknologio. Mi diris, ke mi lacas pro demandoj kaj petas por diverseco kaj ripozo konduki min por ekskurso. Interparolinte krake unu kun la alia neklare, la kubuloj kondukis min al sia subtera uzino – ĝuste tiam mi vidis moviĝantajn koridorojn. Ni veturis ne longe, ĉirkaŭ kvin minutojn, la koridoro kuregis iomete malsupren, pli kaj pli profunden. Evidentiĝis, ke en la uzino estas enue: murmuris mekanismoj, tondris transportiloj tre similaj al niaj. Ni trapasis uzinajn fakojn kaj haltis ĉe nefinkonstruita parto de la uzino. Tie mi vidis, kiel oni metas elektran kablون – kvadrata kubulo, kaŝinte sin malantaŭ konektotabulo, sidis kun plasma tranĉilo apud muro kaj tranĉadis truon en ĝi. Blua plasmopulsis kaj brilis, la muro degelis. Apude kuŝis ankoraŭ du tranĉiloj – ŝajne iliaj posedantoj foriris por ripozi.

Oni kondukis min al kablurulaĵo, kaj la konversacio transiris al elektro. Ni parolis longe kaj vigle. Evidentiĝis, ke anstataŭ metalaj dratoj en potenckabloj la kubuloj uzas metalajn tubetojn, malplenajn interne. Kian sencon tio havas, mi ne komprenis – al la Vortaro ekstreme mankis elementaj konceptoj, plej verŝajne pro tio ke Paŝka, fakulo pri neekzaktaj sciencoj, tutsimple ne konis ilin. Kaj tio ne estas mirinda – pri fiziko en la lernejo li ricevis tri poentojn, kaj eĉ tion dank’ al mi.

Poste ni revenis, oni proponis al mi iri al mia ĉambro kaj ripozi. Mi demandis, ĉu mi povas interkomuniki kun la grupo – ekzemple kun Paŝka, kun Oksana? Almenaŭ por interŝanĝi impresojn. Sed oni respondis al mi, ke tio ne eblas.

## LA DUA NOKTO

La duan nokton mi denove vekis pro krio. Ĝus eksoninte, la krio abrupte ĉesis, sed nun mi ĝuste sciis, ke tio estas ne sonĝo, sed tute reala homa

krio. Salte ekstarinte, mi eliris en la koridoron, ŝtele kuris ĝis la konata balkono kaj rigardis malsupren, al la halo. La laboratorio estis malplena. Kaj sur la tablo, kie hieraŭ estis fiksita Paŝka, denove videblis du homaj gamboj – en malhela pantalono kaj ledaj ŝuoj, kiajn havis niaj militistoj. Sed la duonsfero super ili ne estis. La gamboj estis detranĉitaj kaj kuŝis fiksitaj en sangoflako – tiom malorde, kvazaŭ oni lasis ilin ĉi tie post ordinara labortago.

Jes, mi ne sciis, kiel konduki. Tial mi kondukis laŭ la instrukcio – nature. Sen hezito kaj tro longa pensado. Mi mole trairis la koridoron kaj turniĝis al la rapida eskalatoro – feliĉe ĝi funkciis. Neniun renkontinte, mi ĝisveturis la uzinon, antaŭ la pordego de la produktejo mi mole saltis suben kaj komencis moviĝi inter la ilmaŝinoj je kurtaj trakuradoj. Sed la uzino estis malplena. Kaj la tranĉiloj kuŝis samloke, kie mi vidis ilin hieraŭ. Kompreni kiel oni ŝaltas la tranĉilon, kie estas la ellasilo kaj kie estas ŝargindikilo al mi ne estis pene – ĉio ĉi estis facila. Mi prenis la plej ŝargitan tranĉilon, firme premis ĝin kaj iris reen. Nun mi nenium timis.

Mi konsciis, ke mi devas atingi la Portalon kaj provi reveni sur la Teron. Sed mi ne memoris la vojon al la Portalo, mi simple sciis, ke ĝi estas ie sur la surfaco, sed mi estas en la profundo de la grundo. Tial mi decidis nepre trovi iun el niaj teamanoj. La koridoroj de la etaĝo estis malplenaj, mi iradis tra ili, enrigardante ĉiun pordaperturon. Foje mi trovis tie malplenajn kamerojn, foje – tenejojn plenajn de ujoj. Sed spuroj de nia grupo nenie estis. Kaj poste mi aŭdis tre malproksime trilojn kaj preskaŭ neaŭdeblan voĉon de Oksana. Mi impetis al la sono kaj longe erarvagadis tra la koridoroj. La sono jen plilaŭtiĝis, jen malaperis, foje mi sentis, ke mi perdis la vojon, sed finfine la trilo aŭdiĝis kun nova forto tute proksime.

– Al vi necesas reveni en la kameron! – diris en la orelo Paŝka, kaj mi ektemis.

Tuj eksonis la voĉo de Oksana. Tiom histeria mi neniam aŭdis ĝin:

– Mi postulas revenigi min al la Tero! – kriis ŝi. – Vi ne rajtas! Mi estas civitanino de la Tero!

Responde eksonis nova trilo, kaj la Vortaro en la orelo tradukis:

– Al vi necesas reveni en la kameron! Tion preskribas la ordo! Via reveno ne estas planita. Tion preskribas la ordo. Vi kondukas kiel rabia organismo!

Mi profunde ekspiris, pli firme kunpremis la kolbon de la tranĉilo kaj elsaltis en la halon. Oksana staris malproksime ĉe muro, kaj unu rigardo al ŝi sufiĉis por kompreni – ŝi estas ĉe la limo de histerio. Ĉirkaŭ ŝi staris kelkaj grandaj kubuloj.

– Kio ĉi tie okazas? – demandis mi laŭte.

La kubuloj abrupte turniĝis.

– Geĉjo!!! – kriis Oksana. – Vivanta!!! Geĉjeto!!! Fuĝu!!! Ili mortigas! Ili mortigas Paŭlon! Mortigas ĉiujn!!! Mortigas Arkadion, kiam li provis haltigi ilin! Mi pensis, ke ankaŭ vin ili mortigas!!! Du el ili havas armilojn!!! Fuĝu, vi sukcesos!!!

Kaj kvazaŭ laŭ komando du kubuloj flankeniris al la muro, sed la du restintaj etendis la artikojn – en la pinĉiloj ili tenis brilantajn globojn. Mi saltis flanken, kaj tio estis ĝustatempe – la globoj ekflamis, kaj la lokon en la spaco, kie mi ĵus staris, por momento kovris densa nubo de malhelruĝaj fajreroj.

Funkciis la refleksoj – mi denove saltis flanken, sed falante mi saltlevis la tranĉilon kaj premis la ellasilon. La karapaco de la proksima kubulo krevis kaj larĝe malfermiĝis, disĵetante sur la planko bolantan buljonon kun buloj de la organeloj. La globo falis el ĝia artikoj. Mi direktis la tranĉilon al la alia kaj denove premis la butonon. Malsukcese – la plasma lango vipis iomete super la karapaco.

Mi transkapiĝis kaj denove saltis – nova malhelruĝa kokono ekflamis preskaŭ apude.

– Malantaŭe!!! – subite aŭdis mi la krion de Oksana.

Mi abrupte turniĝis – malantaŭ mia dorso ĉe la enirejo staris ankoraŭ du kubuloj, ambaŭ kun armiloj. La sekvon mi memoras neklare – dum kelkaj sekundoj mi ĵetadis min inter flamoj, transkapiĝis sur la planko, saltadis kaj pafadis responde. Mi memoras la krion de Oksana, sed mi ne vidis, kio okazas al ŝi. Kiam mi neniigis ambaŭ kubulojn, mi turniĝis.

Oksana tordiĝis sur la planko, al la planko ŝin premis du kubuloj, kaj tria jen kaj jen batis ŝian malfermitan vizaĝon per la maldikaj akraj pinĉiloj de la artikoj. Mi saltlevis la tranĉilon kaj forpafis la duopon, kaj la tria lerte forrampis kaj ion klake diris.

– Rezisti senutilas, rabia organismo, – diris la Vortaro. – Rezisti senutilas. Rabiulojn oni likvidas.

Mi haste premis la ellasilon, kaj la grincado abrupte ĉesis. Kurinte al Oksana, mi fale surgenuiĝis antaŭ ŝi. Ŝi kuŝis surdorse, spasme kunpremite sur la ventro la manojn, kaj puŝe spiris. Ŝia vizaĝo transformiĝis en sangan kaĉon. La lipoj kaj vangoj disŝiritaj. Kaj kie antaŭe estis la verdaj okuloj, nun pulsus du malplenaj kripligitaj okulkavoj, eligante brunan sangon.

– Geĉjo – flustris ŝi. – Vi sukcesos... Fuĝu... Diru...

– Oksana! – flustris mi. – Oksana!

Ŝia korpo subite arkiĝis kaj poste malrapide senfortiĝis. La manoj sur la ventro disiĝis unu de la alia kaj falis laŭlonge de la korpo simile al senvolaj viŝtukoj. Nun evidentiĝis, ke dum tuta ĉi tempo – dum ŝi luktis, dum oni batis per la artikoj ŝiajn okulojn – ŝi premis enmane globon-radiilon, kiun ŝi forprenis de atakanto.

– Adiaŭ, Oksana, – flustris mi. – Mi penos.

Mi prenis de sur ŝia pojno maldikan arĝentan ĉeneton kaj metis ĝin en la poŝon de mia jakoj. Ni konis unu la alian nur kvar tagojn, sed ŝi ĉiam portis tiun ĉenon. Mi ĵetlevis la tranĉilon kaj kuris laŭ la koridoro.

Se mi renkontis kubulojn, mi pafis por mortigi. Foje tuta grupo kun globoj-radiiloj elsaltis renkonte al mi, sed mi sukcese plonĝis en flankan koridoron, kvankam mia ŝultro estis iomete bruligita. Mi sciis, ke mi estas subtere,

kaj necesas iri supren al la loko, kie estas la Portalo. Sed mi ne memoris la vojon, kaj la koridoroj, kiuj komence kondukis supren, ofte kurbiĝis kaj direktiĝis profunden malsupren. Sed mi tamen elgrimpis sur la surfacon. Kaj kiam mi elgrimpis, mi komprenis, ke mi ne povos trabatali al la Portalo. La malfermita spaco estis plenplena de kubuloj, ili estis tiom multaj, kiom da homoj estas tage en vivoplenaj stratoj de granda urbo. Kaj tiuflanke, kie estis la Portalo, malproksime videblis figuroj de kubuloj-batalantoj – en artikoj, alte levitaj super la amaso, ili tenis globojn. Kaj tiam mi kuregis alidirekte – tien, kie elstaris la plej larĝa kolono. Finfine, ankaŭ kapti ostaĝon estas efika metodo. Precipe se kapti altrangan ostaĝon. Kiom mi eraris...

## **FREMDA LOGIKO**

– Mi ne vidas logikon, – ripetis la kubulo.

Paroli kun ĝi estis senutile. Estis tempo fari tion, por kio mi venis.

– Aŭskultu min atente, – diris mi. – Vi tuj ŝaltos la terminalon kaj kontaktos viajn anstataŭantojn. Ĉu vi komprenis? Vi klarigos, ke via vivo estas en miaj manoj. Se ili ne plenumos miajn postulojn, vi mortos. Mi postulas, unue, revenigi min al mia hejma mondo. Due, redoni la restaĵojn de mia grupo...

– Mi aŭdis la novaĵon, vi estas la rabia homo, kiu eskapis el la laboratorio kun tranĉilo, – trankvile diris la Kubulo. – Vi estas tre agresema.

– Jes, tre agresema, – kapjesis mi kaj kunpremis la dentojn. – Ŝajne vi ne komprenas vortojn?

– Via popolo ĝenerale estas tre agresema, – aldonis la kubulo.

Mi ne eltenis kaj ĵetlevis la funelon – plasma radio traplugis en la muro super la kubulo longan arkon. Ĝin superŝutis fumanta cindro.

– Kiel vi aŭdacas nomi mian popolon agresema? Vi estas murdistoj! Hipokrituloj! Kanajloj!

– Se vi bezonas mian vivon, – interrompis la kubulo, – kial vi ne forprenas ŝin? Sed se vi ne bezonas – kion vi volas de mi, rabiulo? Komprenu: viaj agoj estas agreso. Rabiulojn oni likvidas.

– Estos ne tiom facile fari tion, – mi firme premis la kolbon. – Kaj mi mortos kun vi, prezidento. Aŭ kiel vi nomas la ĉefan postenon?

– Ni ne havas ĉefan postenon, – respondis la kubulo post longa paŭzo.

– Ĉu tio ne estas la ĉefa konstruaĵo? – demandis mi kun streĉa atento.

– Tiu ĉi konstruaĵo estas la plej granda, – konsentis la kubulo.

– Ĉu tio ne estas la kabineto de la supera reganto? – Mi malfrue komprenis, kial mi sukcesis trabatali ĉi tien multe pli facile ol mi atendis.

– Tio estas antikva biblioteko, – klarigis la kubulo. – Mi estas... – La Vortaro hezitis, serĉante la vorton, – mi estas veziro. La veziro de la biblioteko.

– Sed kie estas la prezidento? – demandis mi per senespera voĉo, jam komprenante, ke ĝi ne mensogas.

– Kio estas prezidento? – demandis la kubulo.

– Sed kiun do vi havas? – kriis mi, komprenante, ke ni ĝis nun eksciis nenion pri la kubuloj. – Kiun? Ĉu superan femalon? Imperiestron? Kie estas la ĉefa individuo, kiu decidis?

– Decidas la socio, ne individuo, – diris la kubulo. – Estas sistemo por fari decidojn, sed ĝi estas tro komplika, ne eblas klarigi ĝin al vi. Ekzistas fakula konsilio, kolegio pri elektado, sumo de rezonadoj... Eĉ plej malgrandan decidon partoprenas ne malpli ol mil kubuloj. Sed nun ĉiuj fakuloj okupiĝas pri la demandoj de la milito.

Mi sentis bulon en la gorĝo.

– Milito? Ĉu do vi militas *kontraŭ ni*?

– Ni deziras pacon kaj amikecon. Militas vi. Vi estas plenaj de timo kaj suspekto. Vi prepariĝas al milito, montras agresemon, vi ne akceptas... – la Vortaro hezitis, serĉante la ĝustan vorton, – niajn donacojn...

Mi levis la tubon de la tranĉilo kaj pliproksimiĝis.

– Do, agresemon montras ni? Prepariĝas al milito? Sed kiu komencis la kontakton, demonstrante sangan batalon? Dek du kubuloj hakis unu la alian je pecoj – ĉu tio ne estas demonstrado de agresemo kaj preteco al milito?

La kubulo longe silentis. Fine ĝi diris:

– Homo, eĉ se via popolo havas logikon, ĝi estas senfine malproksima de la logiko de raciaj estaĵoj. Ĉu vi efektive tiel mise komprenis nin? Tio estis la unua donaco, kiun nia popolo alportis al homoj, por ke vi povu esplori la strukturon de niaj korpoj. Ni fordonis tiujn kelkajn vivojn por montri niajn bonajn intencojn. Kio estas nekomprenebla? Se iu donacas manĝaĵon – tio signifas, ke li ne malsatas kaj ne intencas forpreni aliulan pecon. Se socio donacas siajn vivulojn – tio signifas, ke ĝi ne bezonas viajn, ĉu logike?

– Logike?! – muĝis mi indigne.

– Mi klarigas, – tolereme daŭrigis la kubulo. – Milito postulas multajn batalajn unuojn. Se socio facile oferas individuojn – sekve, ĝi ne planas militon. Ĉu logike? Kaj se ĝi ŝparas resursojn – sekve, ĝi prepariĝas al batalo, ĉu logike? Ni faris agon de konfido. Vi – respondis per malfido kaj suspekto.

– Sed ĉu vi ne pensis, ke eble ni nur malŝatas ajnan perforton? – kriis mi, svingante la tranĉilon de flanko al flanko. – Eble por ni estas sakrilegia la ideo mem forpreni aliulan vivon?!

– Kial do – “forpreni”? Sed se mi pretas libervole fordoni ĝin?

– Por kio?! Vi ja havas propran kapon, aŭ kion vi havas! Ĉu do vi ne deziras vivi? Fari viajn aferojn? Krei ion?

– Tio estas duagradaj deziroj, – respondis la veziro. – Sed ekzistas ĉefaj. Eble ankaŭ vi nun deziras ion duagradan, ekzemple preni de la breto kristalojn kun libroj kaj legi ilin. Sed vi estas okupita pri la parolado, ĉar ĝi estas pli grava por ni, ĉu prave? Plej verŝajne vi neniam havos la ŝancon foliumi tiujn librojn. Sed vi ja ne multe zorgas pri tio, ĉar estas pli gravaj aferoj, ĉu ne? Do kial mi zorgu, ke mi

ne plu havos eblecon legi miajn librojn kaj fari aliajn personajn aferojn?

– Sed... – mi estis konfuzita.

– Ĝenerale, – daŭrigis la kubulo, – kial vin tiom maltrankviligas, ke vi ne povos fari ion en la estonto? Kial vin ne maltrankviligas, ekzemple, ke vi ne sukcesis fari ion en la pasinto? Kial vin entute via persona sukceso maltrankviligas pli ol la sukceso de via socio?

– Sed kian do rilaton tio havas al la socio, se temas pri mia vivo! Kiom idiotan logikon vi havas!!!

– Homo, – diris la kubulo, – ne ekzistas idiota logiko, alie ĝi ne estas logiko. Se logiko estas – ĝi estas logika. Se mi estas racia estaĵo – mi povos klarigi. Se vi estas racia estaĵo – vi povos kompreni. Foje al mi ŝajnas, ke vi estas racia. Eble la kaŭzo estas, ke helpe de la Vortaro vi bone posedas la lingvon. Verŝajne vi bone komprenas ankaŭ miajn vortojn. Ĉu vi komprenas?

– Jes.

– Do diru al mi, homo, kial vi tiel timas perdi vian vivon? Ĉu vi havas tiom da ĝi, ke estas domaĝe perdi? Ja via plurĉela korpo tute ne estas por ĉiam. Vi vivis malmulte kaj mortos baldaŭ. Rigardu nin: niaj korpo kaj menso reproduktiĝas per duplikatado, do laŭ via kompreno ni estas senmortaj. Sed se la socio bezonas mian vivon – ne gravas kial, eĉ por bagateloj – kiajn kialojn mi havas por ne fordoni ĝin? Ĉu vi komprenas?

– Ĉu vi ĉiuj estas libervolaj suicidantoj?

– Eblas diri ankaŭ tiel. Sed ĉu via kontakta grupo ne konsistis el volontuloj?

– Kion?! – mi konsterniĝis. – Ĉu do vi serioze opiniis, ke ni venis morti?

– Sed kiel alie? Oni donis vin je nia plena dispono por la sukceso de kontakto. Ĉu vi ankoraŭ havas iujn aferojn en via mondo? Iun informon, kiun vi ne sukcesis savi? Ĉu por la socio estas malfacile vivi sen vi? Sed nun ni ja scias, kiel funkcias via korpo, kiel funkcias via metabolo, ni sukcesis konstrui la Vortaron-tradukilon...

– Sed... – mi ne trovis vortojn. – Sed ĉu vi ne vidis, ke la homoj krias?! Rezistas!

– Ni pensis, ke tio estas la kutima fiziologia normo en la momento de pereo.

Kaj tiumomente aŭdiĝis obtuza bruo el la direkto de la enirejo.

Mi pafcelis la barikadon el ŝrankoj, sed ankaŭ la kubulon mi tenis vidata. Oni frapis de ekstere – komence timeme, poste pli forte. Verdire, tiumomente mi jam ne sciis, kion fari. Mi ne havis aliajn variantojn krom atendi, kiam la barikado detruigis, kaj poste tranĉi ĉiujn ĝis kiam ili mortigos min. La situacion savis la kubulo.

– Nenion faru, foriru! La rabia homo estas ĉi tie kun mi. Ni havas gravan konversacion! – tiel tradukis la Vortaro tion, kion ĝi pepis.

Ŝajne tiu veziro de la biblioteko tamen gravis en la socio, ĉar la batoj

ĉesis, kaj la eksoninta etpaŝa susuro indikis, ke la kubuloj obeeme forrampis.

Mi paŝis malantaŭen, apogis mian dorson al la muro kaj malrapide ekkaŭris. Tamen sen ellasi la tranĉilon el la manoj. Ŝajne mi komencis kompreni ion. Kaj kial ili ne estas plurĉelaj, kaj kial ili ne havas reganton...

– Ĉu mi ĝuste komprenis, ke vi estas kolektiva racio? – demandis mi.

– Ni estas la racio de kolektivo, – korektis la veziro.

– Ĉu tio signifas, ke vi estas ne aparta individuo, sed parto de la organismo? – pliĝustigis mi por ajna okazo.

– Kompreneble, – respondis la veziro. – Mi estas parto de la socio. Sed ĉu vi ne estas parto de via socio?

– Do, ĉu, parolante kun vi, mi parolas kun ĉiuj kubuloj samtempe? – resumis mi.

– Certe ne, – diris la kubulo kaj malkviete moviĝis sur sia loko. – Kiam vi diras persone al mi – vi diras persone al mi. Ĉiu kubulo havas sian propran apartan intelekton, se tion vi celas.

– Do, mi nenion komprenas, – suspiris mi. – Ĉu vi tiom malalte taksas la vivon de la raciportanto?

La kubulo denove moviĝis sur sia loko.

– Aŭskultu, homo. Viaj korpoj konsistas el multaj ĉeloj. Ĉu ĉiu ĉelo estas tiom valora por vi, ke vi ne povas donaci eĉ guton da sango? Ni esploris vian fiziologion, tiel ne estas. Vi facile perdas viajn ĉelojn.

– Pardonu, kara! – kriis mi. – Niaj ĉeloj ne estas raciaj, ili estas nur konstrua materialo de la organismo!

– Ĉu tio principe gravas? – la veziro haltis kaj denove moviĝis sur sia loko. Ŝajne tiu gesto signifas ĉe ili profundan pensadon. – Diru al mi: se la miliardoj de viaj ĉeloj estus raciaj, ĉu vi tutegale timus perdi almenaŭ unu? Estas ja miliardoj da ili.

– Tio estas privata afero de la ĉelo! – senhezite diris mi. – Neniu rajtas forpreni la vivon de racia estaĵo!

– Ŝajne mi preskaŭ komencis kompreni vin, – penseme diris la veziro. – Sed diru al mi, homo, se la ĉelo estas racia, ĉu vere ĝi rifuzos ĉesi ekzisti por la profito de la organismo?

– Racia estaĵo ĉiam havas la rajton elekti, – firme diris mi.

– Jen kiel? – surpriziĝis la veziro. – Kaj se ĉiuj kondutos tiel? Se ĉiuj diros tion? Kio okazos tiam al la socio?

Mi silentis.

– Ĝenerale vi estas tre strangaj estaĵoj, – fine diris la veziro. – Vi eĉ estas konstruitaj mirinde – la molaj histoj de via korpo elstaras eksteren, kaj la ostoj troviĝas profunde interne.

– Sed ĉu tio estas malĝusta? – konsterniĝis mi.

– Ne estas logiko, – diris la kubulo. – Estas logike, kiam organismo protektas per karapaco siajn molajn histojn de la ekstera medio. Sed kian sencon



havas teni la ostojn en la korpo, ĉirkaŭiginte ilin per mola vundebla histo? Kvazaŭ vin disŝiras io el la interno, kvazaŭ vi timas agreson de interne pli ol de la medio. – La veziro iom silentis. – Diru al mi, homo... – komencis ĝi. – Ĉu mi ĝuste komprenis, ke ĉiuj homoj ĉiam faras nur tion, kion ili bezonas por si mem?

– Ja ne! – kriis mi. – Mi volas diri... M-m-m...

– Homo, diru al mi, – daŭrigis la veziro, – se en via korpo unu el la ĉeloj ĉesos obei la ĝeneralan ordon? Komencos forpreni manĝaĵon de aliaj, nekontroleble kreskos, senfine multigo?

– Ni havas tiun malsanon – kanceron.

– Malsanon, – ripetis la veziro penseme. – Jen kiel interese... Ankaŭ ni havas tiun psikan malsanon – ni nomas ĝin rabio. Kiam iu perdis sian racion kaj ĉesis obei la socion. Tiam oni likvidas ĝin, por tio estas specialaj batalaj brigadoj. Oni likvidas ĝin ĉiel ajn – ja tia estaĵo estas danĝera por aliaj.

– Dankon, mi vidis, – kapjesis mi, skuante la rigidiĝintan ŝultron.

– Homo, diru al mi, – la veziro rekomencis kaj por longe enpensiĝis, moviĝante sur la planko. – Diru al mi, homo, ja, se ekzistas tuta popolo, kie ĉiu estaĵo ĉefe zorgas ne pri la bono de la socio, sed pri sia propra sorto kaj persona profito... – ĝi eksilentis.

– Nu? – demandis mi senpacience.

– Eble mi diros ion stultan, – avertis la kubulo. – Eble en mia rezonado estas eraroj. Mi nur provas konstrui logikan bildon, bazitan sur tio, kion vi rakontis.

– Nu, do?

– Diru al mi, homo, ja, se ekzistas socio, kiu konsistas el tiuj, por kiuj pleje gravas ilia propra sorto... Kiel povas ekzisti tia socio? Ĉu en ĝi neeviteble komenciĝos lukto? Malordo? Bataloj, militoj? Ĉu ĉiu volos forpreni aliulajn aĵojn aŭ vivojn? Ĉu ĉiuj konkurencos unu kun la alia? Ĉu aperos tiuj, kiuj volos regi la aliajn? Ĉu ĉiu devos pensi ĉiusekunde, kiel fari sian hejmon neatingebla, kiel kaŝi personajn aĵojn kaj kaŝi sin mem de aliula agreso?

– Sed ... – komencis mi ofendite, sed la veziro averte svingis sian artikon. – Mi nur provas rezoni laŭ la vidpunkto de via logiko. Kiam mi finos, vi korektos min kaj ĉion klarigos. Se rezoni logike, tia socio ekzisti ne povos. Kiu laboros, se ĉiuj sidiĝos gardi siajn proprajn objektojn kaj manĝaĵon? Tial iutage individuoj devos kuniĝi en grupojn, kiuj komencos protekti siajn membrojn, kaj kompense – gvidi ilian konduton. Ĉu mi ĝuste rezonas? Tiaj grupoj havos samtempe du celojn. Tiel ŝajnas al mi. Unue, la grupoj heredos la psikologion de siaj membroj kaj tute same provos venki la ĉirkaŭajn grupojn, subigi ilin kaj riĉiĝi je ilia kosto. Due, la grupoj suferos pro interna batalado – iliaj partoprenantoj interne daŭre konkurencos kaj batalos por la rajto regi.

– Sed... – diris mi, tute perpleksa.

– Mi nur provas rezoni, – klarigis la veziro. – La grupoj komencos kreski dank’ al konkero de najbaroj, kaj fine restos kelkaj plej grandaj grupoj, kiuj

interbatalos por resursoj kaj luktos por severa ordo kontraŭ internaj ribelantoj... Eble iumomente eĉ aperos unu granda grupo, sed por nelonge – la grupo ne povos reteni la internan lukton, kaj ĝi disfalos en plurajn pli malgrandajn. Tiaj procezoj de unuiĝo kaj disiĝo estos ripetataj senfine... – La veziro eksilentis por momento. – Nun mi pretas aŭskulti vin. Kio estas erara en mia logika rezonado?

Mi kunpremis la dentojn.

– Homo, kial vi ne respondas? – ripetis la veziro.

– Vi pravas... – elpremis mi. – Ĝuste tiel estas aranĝita nia mondo...

La veziro silentis longe. Poste supre sur la karapaco malfermiĝis truo, el ĝi elrampis la okulo sur tigo. La okulo fikse rigardis min kaj longe-longe esploris. Poste kaŝiĝis.

– Ĉu mi rajtas fari lastan demandon? – diris la veziro.

– Vi rajtas.

– Diru al mi, homo... Ja, se mi pravas... se tiel estas aranĝita via socio... – ĝi paŭzis, moviĝante sur la planko. – Ja tio signifas, ke en bataloj inter individuoj, kaj precipe en bataloj inter grandaj grupoj, devas konstante pereii homoj? Ĉu en via mondo devas esti nekredibla kvanto da mortoj pro la interbatalado? Ĉu estas tiel?

– Tiel... – elspiris mi.

– Kaj tiam mi ne komprenas, – resumis la veziro kaj apogis sin al la muro. – Ĉi tie estas logika kontraŭdiro! Se vi tiom alte taksas vian vivon, se ĝi estas plej valora por vi, se vi domaĝas foje fordoni dekon da vivoj por la bono de la socio, kial vi ne bedaŭras tiujn vivojn, perditajn en la konstanta batalado? Ja verŝajne estis kazoj, kiam pereis... – la veziro hezitis, – miloj da individuoj? Eble mildekoj?

– Milionoj, – diris mi, kunpremite la dentojn. – Dekoj de milionoj. La dua mondmilito, antaŭ sesdek jaroj...

– Milionoj... – penseme diris la veziro. – Milionoj... Sed kie do estas via logiko, homo, tiel amanta la vivon? Mi klarigis mian logikon, ĉu nun vi povos klarigi al mi la vian?

– Sed... – mi glutis la salivon. – Sed kompanse ni estas liberaj!

– Sed ĉu ni ne estas liberaj? – surpriziĝis la veziro.

– Sed kompanse ni... – mi abrupte haltis, sed subite eksplodis: – Ni vivas, kiel ni volas!!! Neniu tuŝas!!! Al neniuj trudas nian logikon!!! Kial do tio gravas al vi?!! Damne, kiel tio koncernas vin?!!

– La portalo estas malfermita, – memorigis la veziro. – Fermi la Portalon ne eblas principe. Ni ne atendis renkonti malamikan rason. Mia popolo ĉiam deziris pacon kaj amikecon, ni estis feliĉaj, kiam ni trovis rason tiom similan al ni korpe kaj vivmaniere...

Mi pense suspiris, provante imagi, kiajn rasojn ili renkontis antaŭ veni al ni, kaj la kubulo daŭrigis:

– Plej malmulte ni atendis renkonti tiajn insidajn malamikojn. Se

aliflanke de la Portalo vivas raso de rabiuloj, kies konduton ne regas eĉ ilia propra socio, kie estas garantio, ke iam ili ne decidis veni al ni por forpreni niajn vivojn kaj riĉaĵojn?

– Nia socio estas ne tiom malbona! – ofendiĝis mi. – Ankaŭ nia socio bone regas individuojn! Neniu intencas batali kontraŭ vi! Ĉe ni delonge ne estas militoj!

– Ĉu delonge – estas sesdek jarojn? – diris la veziro, kaj al mi ŝajnis, ke la Vortaro transdonis en la intonacio iom da amara ironio.

– Jes! Sesdek! Tio estas tre multe! Ĉio ŝanĝiĝis! Ni estis pretaj amiki kun vi, kunlabori! Ni ne bezonas viajn vivojn! Ĉu ni mortigis iun el via kontakta grupo?

– Estus pli bone, se vi mortigus, – rimarkigis la veziro.

– Ni simple timas vin! Terure timas! Kaj ni havas tre gravajn kialojn por tio!

– Sed ni timas vin eĉ pli. – Kaj ni havas eĉ pli multajn kialojn... Diru al mi, homo, ĉu vi scias la lastajn novaĵojn?

– Ne, – diris mi kun streĉa atento.

La kubulo iom silentis.

– Viaj sciencistoj, – komencis ĝi, – ne sukcesis venki la lingvan barieron kun nia kontakta grupo. Ili longe interkomunikis per gestoj kaj desegnaĵoj, kaj tio, kion ili komprenis, hororigis ilin. Kaze de milito via socio minacas ĵeti tra la Portalo atoman bombon.

– Ili povas, teorie... – mi sulkgis la brovojn.

– Sed ĉu vi estas kapabla imagi... – komencis la Vortaro per parolturno tiom karakteriza por Paŝka, ke mi ekremis denove, – kion povas fari atoma bombo en mondo, kie ne estas – la Vortaro paŭzis hezite, – malfermita supro...

– Sed vi ne havas ankaŭ venton, – kontraŭis mi. – Do ne estos ŝokondo.

– Estos temperaturo, – kontraŭis la kubulo. – Kaj tiam ĉi tie restos tute nenio. Neniu intertraktado donis sukceson. Kaj kvankam ni ne havas atoman bombon, ni havas plasman fuzeon.

– Kio estas ĝi? – mi streĉis la atenton. La strategia informo de la malamiko neniam estas superflua, eĉ se mia sorto estas neniam plu vidi la Teron.

– Mi ne tre kompetentas pri fiziko, – konfesis la veziro. – Tiu objekto estas aparte danĝera en mondo, kie la supro estas malfermita – la ŝargo ne povas difuziĝi, kaj la plasmato ĉirkaŭiras la tutan atingeblan surfacon, okazas ĉena reakcio. Vi ne saviĝos.

– Tio estas frenezaĵo! – kriis mi.

– Frenezaĵo, – konsentis la kubulo. – Niaj rasoj venis al la konkludo, ke kontakto ne eblas, kaj najbareco estas morte danĝera. Nun kalkulataj estas nur horoj, la demando nun estas, kiu batos unua. Tio povas okazi ajnmomente.

– Ĉu tio estas vero? – demandis mi.

– Ni ne mensogas, – trankvile respondis la veziro. – Tio estas vero.

– Do, ĉu vi batos unuaj? – subite ekkonsciis mi.

– Tion decidis ne mi, – respondis la veziro. – Sed la varianto ne estas ekskludita. Sed ĉu vi povas bati unuaj?

Mi estis konfuzita.

– Mi ne scias. Verŝajne ne. Ĉu nian flankon reprezentas Rusio aŭ Usono? Ja Usono jam havis la kutimon ĵeti atomajn bombojn ien ajn sur vivantan loĝantaron...

– Tio ne gravas, – certigis la kubulo. – Gravas, ke niaj rasoj konsideras unu la alian malamikoj, kiujn pli facilas mortigi ol toleri. Mi mem opiniis tiel antaŭ la parolo kun vi. Kaj via socio, kaj la mia pretas ataki. Mi ne estas militisto, sed al mi ŝajnas, ke ĉiu flanko havos sekundon por respondo, kaj tio signifas, ke pereos ambaŭ mondoj...

Mi salte ekstaris.

– Do, kial vi sidas, valizo sen tenilo?! Necesas agi! Ŝaltu la terminalon! Ni provu klarigi kaj al la viaj, kaj al la niaj!

La veziro iom silentis moviĝante.

– Nia popolo ne komprenos, – diris ĝi finfine. – Necesas pruvi al ĝi, ke dialogo eblas. Pruvi tre konvinke kaj tre rapide.

– Ankaŭ nia popolo ne pardonos... – Mi metis la manon en la jakpoŝon, trovis la ĉeneton kaj premis ĝis doloro, ĝis krako en la fingroj. Poste mi malrapide malstreĉis la manon kaj diris: – Veziro! Elpensu ion!

La veziro silentis tre longe, moviĝante sur la planko. Poste ĝi diris:

– Estas unu maniero konvinki mian rason...

– Diru ĝin!

– Sed ĝi ne plaĉos al vi, homo...

Kaj mi tuj komprenis, pri kio ĝi parolas. Mi komprenis, ĉar tiumomente la saman penson ekhavis mi.

– Sciu, kubulo... Mi pretas! Se vi pensas, ke mia libervola morto ĉesigos nun militon – mi pretas! Ĉu viaj parencoj kredos, ke ni ne estas rabiuloj, se mi mortos por amikeco inter homoj kaj kubuloj, pruvinte la kapablon kompreni vian logikon? Ĉu ili kredos, ke la konflikto komenciĝis pro miskompreno, sed homaj estaĵoj, same kiel vi, pretas, se necesas, oferi sian vivon por la komuna bono?

– Jes, – respondis la veziro. – Sed ĉu vi vere pretas oferi vian vivon?

– Mi... – mi hezitis. – Mi penas ne ŝanĝi mian intencon...

Ekregis silento. Mi faris kelkajn paŝojn sur la mola kovraĵo de la planko kaj haltis antaŭ ĝi.

– Nu, sed kion faros vi, veziro? Kion faros responde vi, por ke homoj ĉesu opinii rabiuloj vin?

– Sed kion mi povas fari? – surpriziĝis la veziro.

– Jen kion... – Mi sidiĝis antaŭ ĝi, faldinte la gambojn turke, kaj la tranĉilon mi metis apude. Nun ni havis la saman altecon. – Mi rakontu al vi. Vi senprokraste iros al la Portalo. Tra ĉiuj kordonoj kaj baroj. Vi trairos, vi tratalos

al la Portalo, eĉ se oni ne lasos vin, eĉ se oni opinios vin rabiulo. Sed vi trairos kaj iros al homoj, etendante ĉi tiun ĉenon. Homoj ne pafas al intertraktantoj. Vi rakontos ĉion al homoj. Kaj ili komprenos. Kaj poste – vi forgesos pri via socio kaj restos sur la Tero. Homoj ne povos interkomuniki kun kubuloj, se ili ne havos sendependan konsilanton, kiu ne obeas ordonojn.

– Mi ne povas fari tion sen ordono! – kontraŭis la veziro. – La socio neniaokaze donos al mi nun tiun komandon... Necesos longa tempo, por ke la socio ellaboru novan solvon kaj komencu doni komandojn...

– Sed vi faros tion mem, sen komando.

– Mi ne povas! – la veziro abrupte moviĝis kaj eksaltis. – Kial mi?

– Sed mi?

La veziro denove abrupte moviĝis kaj komencis etpaŝe kuradi tien-reen. Ĝia artikolo eliĝis el la truo en la karapaco kaj neregate pendis kiel skurĝo. Fine ĝi haltis antaŭ mi.

– Sed ĉu ne estas alia metodo? – demandis ĝi lamente.

– Sed por mi?

– Por vi ja ne gravas! – indignis la veziro. – Vi ja bezonas fari nur unu agon! Kvankam malagrablan por vi. Sed heroan – por paco inter du civilizoj. Kaj vi ne estos devigita zorgi pri io ajn alia – neniam estos! Sed mi?! Ili opinios min hontinda rabiulo! Mi estos devigita por ĉiam plenumi senfinan kvanton da agoj abomenaj al mi, ignorante la ordonojn de mia socio! Kiel mi vivos plu? Eterne! Kiel vivos miaj duplikatoj? Ja ili vivos en via mondo kiel rabiuloj!

– Kiam ĉio normaligo, ankaŭ vin oni konsideros heroo en la Patrujo.

– Rabiulojn oni ne pardonas, – kontraŭis la kubulo kaj aldonis tute lamente: – Mi ne povas! Kion ajn, sed ne tion! Mi ne povas elteni eternan ekzilon kaj malfeliĉon!

– Sed ĉu mi povas? Ĉu mi povas?

La kubulo ankoraŭ foje trakuris la bibliotekon kaj poste peze falsidiĝis sur la plankon. Ĝi tremis.

– Mi vidas, ke via timo antaŭ la socio estas pli forta ol mia timo de morto, – rimarkigis mi. – Vidu, mi tamen pretas oferi la plej karan por la bono de la socio. Sed vi – ĉu ne?

– Se nur oni ordonos al mi... – lamentis la kubulo.

– Ni oferas la plej karan, – memorigis mi. – Mia vivo estas la plej granda valorajo, kiun mi havas. Kaj por vi plej valora estas via blinda obeo al la socio. Ofere ĝin.

La kubulo eligis sian okulon sur la tigo kaj fikse rigardis min. En la okulo estis pupilo, tute simila al tiu de homo. Verda.

– Vi pravas, – fine diris ĝi trankvile. – Ni ne hezitu, ni ne havas tempon. Ajnmomente povas komenciĝi atako.

– Sed... – mi sentis malagrablan malvarmon. – Mi bezonas konservi certan informon. Mi devas lasi al mia raso rakonton pri tiuj eventoj.

La kubulo montris per sia artikulo al la angulo:

– Mi tamen ŝaltis konservadon de informoj – la terminalo registras la biokurentojn de via cerbo kaj de mia menso, kaj ĝenerale ĉion, kio okazas ĉi tie. Kopion de la kristalo mi kunprenos. Kaj vi nur pensu dum sekundo, kion kaj kiel vi volas rakonti al viaj kunuloj – tio sufiĉas. Poste mi ĉion deĉifros, prilaboros kaj skribos je via nomo – kiel vi vivis, kion vi vidis kaj kion vi sentis. Kredu, mi estas tre sperta bibliotekisto, mi sukcesos.

– Dankon, amiko kubulo, – suspiris mi. – Sukceson en la vivo!

– Adiaŭ, amiko homo, – suspiris ĝi. – Honoron en la morto!

Ĉiuj vortoj estis diritaj. Por momento mi fermis la okulojn kaj imagis ĉion, kion mi rakontus al teranoj. Kaj mi komprenis, ke se mi prokrastos ankoraŭ, mi neniam faros tion, kion mi devas fari. Kaj tiam mi ĵetlevis la tranĉilon, metis la funelon al la tempio kaj premis la ellasilon.

\* \* \*

Sur la kuba piedestalo staras grandega monumento, ĝi estas videbla eĉ de Moskvo. Ĉirkaŭ la monumento etendiĝas larĝa bulvarado, konstruaĵoj de la scienca urbeto kaj de la Universitato de Amikeco. Ĉe la fino de la bulvarado mallumas la Portalo. La monumento figuras larĝaŝultran homon proksimume tridekjaran, en ĝinzo kaj jako. Liajn longajn harojn kvazaŭ flirtigas vento. Levinte sian kapon, li rigardas antaŭen – tra tempo kaj spaco. Lia dekstra mano premas plasman tranĉilon. La maldekstra estas etendita antaŭen, kaj en la malfermita polmo ripozas la Terglobo. Ĉiusemajne, dimanĉe, al la monumento proksimiĝas kelkaj kubuloj. Ĉiuj ili estas gutformaj, kun pinta nazo elstaranta supren kaj iomete flanken. Ĉiujare ili iĝas pli multaj. La kubuloj silente metas apud la postamento freŝajn florojn. Kaj poste longe-longe rigardas supren – al la vizaĝo de la monumento kaj pli supren – al la libera ĉielo. Poste ili foriras. Kaj laŭ la bulvarado iras homoj – instruistoj, studentoj, junaj patrinoj kun infanĉaretoj. Promenas geamantoj man-en-mane. De tempo al tempo preterkuras aferemaj kubuloj plej diversformaj, kiuj venis ĉi tien studi. Tie estas tre bele. Se vi okaze venos al Moskvo – nepre veturu al la Novovolokolamska scienca urbeto. Nepre.

*Aprilo 2005, Moskvo*



***Elrusigis Mikaelo Povorin***

## Kultura projekto

### Rusaj populaj kantoj de la 20-a jarcento

Malliberuloj de la stalinaj koncentrejoj kreis aron da kantoj, pluraj el kiuj fariĝis famaj kaj plu vivis ankaŭ post foriro de stalinismo kaj reprezalioj. Unu el la plej popularaj tiaj kantoj estas “Ritme sekvas vagon post’ vagon” (“Amatin’, ne ĉagrenu cin”), teksto de kiu apartenas al nekonata, sed, evidente, profesinivela aŭtoro. La melodio estas pruntita, kiel oni kutime opinias, de unu kanto de populara en Sovetunio kantisto-elmigrinto Pjotr Leŝĉenko – tango “Nostalgio”. melodeon de kiu verkis Ĵorj Ipsilanti en 1944. Sekve, la kanto povis aperi nur post fino de la dua mondmilito, kiam diskoj kun la kanto disvastiĝis en Sovetio, do – fine de 1940-aj jaroj. Laŭ tiu melodio estis verkitaj ankaŭ kelkaj strataj kantoj (“Griza jupo”, “Knabino en blua bereto” ka.), kiuj, laŭ la stilo, aspektas kiel antaŭmilitaj – sekve, la melodio de “Nostalgio” mem ne estas originala... Ĉiokaze, la prezentata kanto estas la plej populara kanto laŭ tiu melodio kaj, ŝajnas, la plej fama Gulaga kanto.

#### Не печалься, любимая

Вот идет за вагоном вагон,  
С мерным стуком по рельсовой  
стали

Спецэтапом идет эшелон  
С пересылки в таежные дали.  
Здесь на каждом вагоне замок,  
Три доски вместо мягкой постели,  
И, закутавшись в сизый дымок,  
Нам кивали таежные ели.

Здесь на каждом вагоне конвой  
Ощетинил свои пулеметы,  
И прожектора луч голубой  
Освещал нам снега и болота.  
Заметало пургой паровоз,  
И на окнах морозная плесень.  
И пронзительный ветер донес  
Из вагона унылую песню:

«Не печалься, любимая,  
За разлуку прости меня,  
Я вернусь раньше времени,  
Дорогая, прости.  
Как бы ни был мой приговор строг,  
Я вернусь на родимый порог  
И, тоскуя по ласкам твоим,  
Я в окно постучусь».

За пять лет трудовых лагерей  
Мы в подарок рабочему классу

#### Amatin’, ne ĉagrenu cin

Ritme sekvas vagon' post vagon',  
Kun la ŝtalo de l' reloj klakante,  
Laŭ etapo al fora peron'  
Ekspedatojn en tajgon lokante.  
Jen sur ĉiu vagono serur'.  
Ne litajoj, sed lignaj tabuloj.  
Envolvite en morna terur'  
Nin salutas pice' el nebuloj..

Jen sur ĉiu vagono gardist'  
Mitraleton hirtigas minace.  
Reflektor' kun lumiga persist'  
Plividigas neĝarojn ĉi-space.  
Trajno sinkis sub muĝa blizard'.  
Frosta ŝimo sur ĉiuj fenestroj.  
Bruis forta ventego kun ard'  
Kvazaŭ morton vokantaj orkestroj.

"Amatin', ne ĉagrenu cin.  
Pro l' disiĝo pardonu min.  
Mi revenos ĝis lima temp'.  
Ĝis ekskuz', karulin'.  
Kiel ajn pezus mia verdikt'.  
Luktos mi por favora restrikt'.  
Sopirante pri via kares,  
Frapos mi al la pord'.

Post kvinjara servuto sen fest',  
Donacita al klas' laboranta,

Там, где были тропинки зверей,  
Прорубили сибирскую трассу.  
Замерзали в снегу трактора,  
Даже «сталинцу» сил не хватало,  
И тогда под удар топора  
Эта песня о милой звучала:

«Не печалься, любимая,  
За разлуку прости меня,  
Я вернусь раньше времени,  
Дорогая, прости.  
Как бы ни был мой приговор строг,  
Я вернусь на родимый порог  
И, тоскуя по ласкам твоим,  
Я в окно постучусь».

Kie pasis la pado de l' best',  
Konstruiĝis ĉi-vojo foranta.  
Glaciĝis traktor' en stupor',  
Kiel ajn la motoro fervoris.  
Tiam do sub ekhak' de topor'  
Tiu kant' pri l' karinjo sonoris.

"Amatin', ne ĉagrenu cin.  
Pro l' disiĝo pardonu min.  
Mi revenos ĝis lima temp'.  
Ĝis ekskuz', karulin'.  
Kiel ajn pezus mia verdikt'.  
Luktos mi por favora restrikt'.  
Sopirante pri via kares,  
Frapos mi al la pord'.

*El la rusa tradukis  
Vladimir Minin*



---

### *CERBE kaj KORE*

*n-ro 10 (78), majo 2019*

*Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 106*

*[eksa Bulteno de REU (BdR)]*

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista U&

*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de  
ĝusta indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

---

Redaktofino 20.09.2019